

HORIZONTO

IV-a JARO N-o 25 (1)
JANUARO - FEBRUARO 1980

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



Pasejo de la
«Schlucht»
(Francujo)

1073

ANKAŬ VI ELIZIAS

PERFIDO DE KLERULO

HOMAJ RAJTOJ: MISPREZENTO DE HISTORIAJ FAKTOJ

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º de la Constitución, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76

N.º 1 - Januaro - Februaro 1980

E N H A V O

LA NOVA STATUTO DE UEA:
KONTRAŬNEŬTRALECA DOKUMENTO
KONFIRMANTA KONTRAŬNEŬTRALE-
CAN PRAKTIKON (Ivo Lapenna)
ANKAŬ VI ELIZIAS (Reto Rossetti)
KOMENTO DE LEGANTO (Klaus Perko)
GÜNTHER BECKER 50-JARA
PERFIDO DE KLERULO (Jean Thierry)
BELETRO
Pentritaj fenestroj (trad. Liven Dek)
Kia renkonto (trad. Liven Dek)
Soleco (trad. Tone Logar)
Vunditoj (trad. Tone Logar)
Sandaloj de Sultano (trad. Tone Logar)
Paŭlo la Fetora —humora rakonto—
(Salvador Gumá)
OMAGE
EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJOJ
Nova numero de Internacia Jura Revuo
HOMAJ RAJTOJ: MISPREZENTO DE
HISTORIAJ FAKTOJ
TRA LA ESPERANTO-GAZETARO
Redaktas (Jean Thierry)
VI-a INTERNACIA KONFERENCO DE
LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
PIONIRA BULVARDO ZAMENHOF

KIEL ABONI

Abonojn al «Horizonto» akceptas la administracio: Inés Gastón, Paseo de la Constitución, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk. Zaragoza 00428398. (Jarabono por Hispanujo kaj Portugalujo 600 ptoj., por eksterlando 700 ptoj. aŭ 12 usonaj dolaroj), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.
Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON N13 4UL. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono: 7 £.
Danlando:
Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 65,— D Kr.
Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, Pĝk. KU 152801-5. Jarabono: 50,— F. Mk.
Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 50,— Fr.
FR Germanujo:
Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773 MÖHNESEE-GÜNNEN. Konto-Nr. 31 377 450 Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85). Jarabono: 24,— DM.
Grekujo:
Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omonia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.
Israelo:
Ben-Alder Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono: 84 izr. liroj.
Jugoslavio:
D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10, YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 216 n. din.
Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO Ont. M4S 2V2. Jarabono: 14,— \$.
Luksemburgo:
Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jarabono: 380 lfr.
Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

KONTRAŬNEŬTRALECA DOKUMENTO KONFIRMANTA

KONTRAŬNEŬTRALECAN PRAKTIKON

La longa historio de diversaj statutprojektoj ekde la hamburgaj eventoj en 1974 ĝis la plej lasta, pri kiu nun okazas (aŭ jam okazis?) ĝenerala voĉdorado estas koncize prezentita en Horizonte, precipe en n-roj 1, 2, 4 kaj 5 de 1979. Nia periodaĵo, fidela al la antaŭhamburga principo de neŭtraleco, kiel formulita en art. 4 kaj 13 de la Statuto de UEA, ekde sia 1-a numero objektive prezentis amason da faktoj, kiuj klare atestas la kontraŭneŭtralecajn kaj tial kontraŭstatutajn agadojn en UEA sub la posthamburgaj gvidantaroj. La plej lasta statutprojekto, kiu en la nunaj kondiĉoj kaj pro la aktuala konsisto de UEA certe estos aŭ jam estas akceptita, ankaŭ formale leĝigas tiun kontraŭneŭtralecan praktikon. Krome, ĝi entenas multajn internajn kontraŭdirojn kaj teknike-jurajn mankojn, kio siavice favoros senbridan partipolitikan propagandon en UEA kaj ebligas eĉ pli da senrezistaj arbitraj agoj de la gvidaj instancoj de la Asocio, troviĝantaj sub daŭre kreskantaj premoj de ekstermovadaj partipolitikaj fortoj.

En la suba artikolo D-ro Ivo Lapenna, antaŭe profesoro de Internacia Publika Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Zagreb, nun profesoro de Kompara Soveta kaj Orienteŭropa Juro en la Universitato de Londono individua membro de UEA/IEL/UEA de 1929 ĝis 1975, ĝia komitatano kaj estrarano seninterrompe dum preskaŭ kvar jardekoj, pritraktas la ĉefajn aspektojn de la nova Statuto, kiu por la unua fojo en la historio de UEA ankaŭ formale senigas la Asocion de ĝia neŭtraleco. Neniu en la Esperanto-Movado estas pli kompetenta por analizi tiun dokumenton el esperantisma kaj jura vidpunktoj, ol persono kun tiaj juraj kvalifikaĵoj kaj tiom da longjaraj personaj spertoj en UEA. — La Redakcio.

IOM PRI «KLARA PROCEDURO» KAJ «ĜANGALAJ KONDIĈOJ»

En artikolo publikigita en n-ro 9/79 de Esperanto D-ro V. Sadler, la nuna direktoro de la CO kaj la estonta «ĝenerala direktoro» de UEA, anoncis per la jam kutimaj bombastaj vortoj la akcepton de la plej lasta statutprojekto de UEA dum la Komitatataj Kunsidoj de la Asocio en Lucerno. Li asertas, ke «la procedura regularo, kiun Tonkin enkondukis en la Komitaton jam en 1975...», en Lucerno pruviĝis unu el la plej valoraj kontribuoj al la Asocio de la nuna prezidanto» (ĉu ne: de la nuna prezidanto al la Asocio?) kaj ke «la sukcesa pilotado de kvindeko da diversopiniaj Komitatanoj tra tuta arĥipelago da proponoj kaj amendoj... al fina ĝenerala konsento pri ĉiuj 60 artikoloj de la nova Statuto, ne estus ebla sen klara proceduro» (p. 149).

Ĝis tiu punkto la aserto ne meritis kian ajn komenton escepte de simpla memorigo, ke sen proceduraj reguloj, ĉu formitaj tra longdaŭra demokrata praktiko, ĉu eksplacite formulitaj, ne estas ebla kia ajn kolektiva decidado. La artikolverkinto povis eĉ pli emfazi la laŭdon kaj diri senkontrolle, ke tiu procedura regularo, laŭ nia scio neniam publikigita, estas la plej valora kontribuo de la nuna prezidanto al la Asocio. Tamen, konforme al la jam firme establita posthamburga praktiko de sistemaj misprezentoj kaj nigriĝoj en la publikaĵoj de UEA, D-ro Sadler ne povis ne aldoni, ke, kontraste al tiu unika «pilotado» surbaze de la nepublikigita procedura regularo, «sub la ĝangalaj kondiĉoj, kiuj antaŭe regis en la decidaj organoj de UEA, ĝi estus neimagebla».

El la kunteksto ne vidigas tute precize, ĉu tiu «ĝi» rilatas al la «sukcesa pilotado» aŭ al «ĝenerala konsento...», aŭ al ambaŭ, sed la plia inventaĵo (jam kiom da ili ekde Hamburgo?) pri iaj kvazaŭaj «ĝangalaj kondiĉoj» estas perfekte klare formulita. Kaj tiu nova malvero estus fakte pli ol ridinda, se ĝi ne estus tiel profunde ofenda por ĉiuj antaŭhamburgaj «gvidaj organoj» de UEA ekde ĝia fondiĝo en 1908.

La vero estas, ke sen tiu nuna «klara proceduro» neniam okazis en la tuta historio de UEA, nek verŝajne de kiu ajn alia kultura organizaĵo, ke oni bezonus pli ol kelkajn monatojn, eĉ nur semajnojn aŭ tagojn, por redakti taŭgan novan statuton aŭ por ŝanĝi

ekzistantan. Malgraŭ la «procedura regularo» — «unu el la plej valoraj kontribuoj al la Asocio de la nuna prezidanto» — aŭ eble ĝuste pro ĝi, la posthamburgaj «gvidaj organoj» fondis kaj post du jaroj malfondis apartan plurmembran statutkomisionon, prezentis aron da statutskizoj tiel evidente fusaj, ke ili estis malakcepteblaj eĉ por la nuna Komitato, kaj entute bezonis pli ol 5 jarojn por fine produkti dokumenton, kiu, eĉ senkonsidere al la forigo de la esence grava principo de neŭtraleco, estas plena de internaj kontraŭdiroj kaj teknike-juraj fuŝaĵoj. Ne ŝajnas, do, ke tiuj nepublikigitaj «klaraj reguloj» estas tiel fruktodonaj, kiel flate kredigas la ĉefoficisto de UEA al la legataro de *Esperanto*. Eĉ por ellaborado kaj akcepto de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj aŭ de kiu ajn ŝtata konstitucio — dokumentoj iom pli gravaj ol la Statuto de UEA! — neniam en la historio oni bezonis kvin jarojn, se oni esceptas la nunan Konstitucion de USSR, iniciatitan de Ĥruŝĉov kaj akceptitan en oktobro 1977 sub Brejnev. Tamen la organo de UEA ne nur ne hezitas laŭdi la «efikecon» de tiu «klara proceduro», sed eĉ kuragaŝ aserti, ke tia unika atingo «estus neimagebla sub la ĝangalaj kondiĉoj, kiuj antaŭe regis en la decidaj organoj de UEA»!

Pri kiuj, do, «ĝangalaj kondiĉoj» skribas la direktoro de la CO de UEA kaj kie li trovis ilin? La vero estas, ke ĉiuj antaŭaj ŝanĝoj en la Statuto, inkluzive la tre gravajn de 1948 okaze de la kunfandiĝo inter IEL kaj UEA, kaj tiujn de 1954-55 kaj 1956 estis glate faritaj en nuraj kelkaj monatoj surbaze de laŭstatutaj demokratiaj proceduroj, kaj neniu kiam ajn venis al la ideo eĉ menci tiu kiel ian atingon. La vero plu estas, ke, agante konforme al la Statuto kaj demokrate akceptitaj Regularoj, la antaŭaj decidaj organoj disvolvis ĉiudirektajn agadojn, kreis novajn instituciojn, demokrate pritraktis kaj akceptis du bazajn laborprogramojn kaj nombron da okazaj laborplanoj, realigis ilin maksimume, gvidis la Asocion de unu sukceso al alia kaj, rezulte, efike disvastigis la lingvon, firmigis ĝiajn poziciojn, fortikigis la Asocion interne kaj altigis ĝian prestiĝon en la ekstera mondo. Sufiĉas legi aŭ relegi la koncernajn partojn de la verko *Esperanto en Perspektivo* (EeP) por konstati tion. Se entute oni deziras uzi la vorton ĝangalo, do ĝi estas aplikebla sole al la politikaj kaj alispecaj intrigoj, subfosadoj, sabotadoj kaj kalumniadoj, inkluzive la nun preparolatan, kiuj siatempe kondukis al Hamburgo kaj kiuj stampas la aktualan bedaŭrindan staton en UEA. Kaj tio estas io tute alia ol la demokratiaj kondiĉoj, kiuj antaŭe regis en la decidaj organoj de UEA, kaj kiuj ebligis sukcesan laboron kaj nekontesteble pozitivajn rezultojn. Viktimoj de tiuj vere ĝangalaj metodoj estis ne nur la subskribinto, sed ankaŭ aliaj elstaraj aktivuloj, kiujn poste la samaj praktikantoj de tiaj metodoj provis aĉeti — nur partete kun sukceso — per donado de oficoj kaj titoloj, «honorigoj», elektado al nefunkciantaj «komisionoj» kaj publikaj flatadoj.

Provizore nur tion pri tiaspecaj falsajoj en la organo de UEA, klare celantaj pravigadi kaj eĉ pli kaŝi la obskuran kaj nepraviceblan estantecon per nigrigado de la senproceĉa klara kaj prava estinteco.

FORIGO DE LA PRINCIPO DE NEŬTRALECO

Kelkaj Vortoj pri la Ĝisnuna Stato

Art. 4 kaj 13 de la ĝisnuna Statuto, nedisigeble kunligitaj, klare difinis la neŭtralecon de UEA konforme al la neŭtrale homa, supernacia karaktero de la Internacia Lingvo, unuflanke, kaj al la sociaj-politikaj kondiĉoj en la mondo post la Dua Mondmilito, aliflanke.

La neŭtraleco de UEA estis jene formulita okaze de ĝia fondiĝo en 1908: «*UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco*». Al tiu baza koncepto estis poste aldonitaj pliaj eroj, parte ne tre sukcesaj, sed esence ĝi restis la sama. La Statuto de 1948, kiu sekvis la kunfandiĝon IEL/UEA, akceptis en art. 4/I la antaŭan formulon, kiu tekstis: «*UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj*», sed, laŭ la propono de la subskribinto, al ĝi estis aldonita nova alineo, kies esenca parto estas: «*UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo*». La propono estis farita dum la iom ekscita UK en Bern meze de 1947, do proksimume unu jaron kaj duonon antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj la 10-an de decembro 1948.

Tiu grava aldono korektis kaj limigis la abstraktan, fakte negativan kaj pasivan, neŭtralecon formulitan en la unua alineo (sub preteksto de tia neŭtraleco la gvidantaroj de la antaŭmilitaj IEL kaj UEA, kun la escepto de la subskribinto, neniam protestis pro la krimoj de la nazioj, eĉ ne kiam Esperanto kaj la esperantistoj estis la viktimoj), kaj transformis ĝin en pozitivan kaj aktivan. Estus ne nur dezirinde, sed vere necese, ke ĉiuj seriozaj interesigantoj pri la nuna pli ol serioza situacio en UEA legu aŭ relegu ĉap. 18.2.1 de *EeP*, en kiu troviĝas analizo pri la signifo de la amendita art. 4, kaj la tutan verkon *Hamburgo en Retrospektivo* (HeR) por plene kompreni la realaĵon. Ĉi tie sufiĉas diri, ke la strikta observado kaj praktikado de la aktiva neŭtraleco, kiel reformulita en art. 4 kaj plu ligita al art. 13, donis al UEA propran, sendependan fizionomion de pozitiva forto en internaciaj rilatoj kaj havigis al ĝi altan estimon en medioj — internaciaj kaj naciaj — sincere celantaj internacian kompreniĝon, proksimiĝon de la popoloj, respekton de la homaj rajtoj ĉie en la mondo, pacon en libereco kaj liberecon en paco.

Art. 4 estus komplete senvalora, se ne ekzistus art. 13, kiu preskribis, ke nur «laŭorde organizita» landa asocio, «neŭtrala laŭ la senco de art. 4» de la Statuto povas aliĝi al UEA, pri kio fine decidis la Komitato konforme al art. 29/ĉ de la Statuto. Kompreneble, ankaŭ tiun esencan regulon oni maksimume observis. Dum mia tuta longa komitataneco kaj estraraneco en IEL/UEA de 1938 ĝis la mezo de 1974 neniam okazis, ke la Komitato estus akceptinta asocion, kiu, laŭ la dokumentoj aldonitaj al la aliĝpeto, ne plenumus la kondiĉojn de art. 13. Estas vero, ke kelkfoje, sub la premo de la politikaj cirkonstancoj en siaj landoj, unuopaj aliĝintaj asocioj devojiĝis de la statute definita neŭtraleco, sed ĝenerale tiuj sporadaj kaj relative sensignifaj devojiĝoj ne endanĝerigis la neŭtralecon de la Asocio. Se, tamen, la devojiĝoj escepte transpasis la maksimume permeseblajn limojn kaj tial minacis kompromiti la neŭtralecon de la Asocio. la antaŭhamburgaj gvidaj instancoj ja senprokraste plej energie reagis kaj tuj elradikigis la minacon. Sufiĉas sufraĝe mencii la konfiskon de partipolitika flago en Tokio (1965), aŭ la firman reagon kontraŭ la partipolitika propaganda parolado de la Ambasadoro de GDR dum la inaŭgura kunsido de la UK en Budapeŝto (1966), aŭ la malpermeson distribuadi partipolitikajn materialojn en la kongresejo de la UK en Helsinki (1969), aŭ la rifuzon de la postulo, ke en *EeP* estu ellasita la parto pri la persekutoj de Esperanto en Soveta Unio, ktp. (detalojn v. en *HeR*).

La firma kaj senkompromisa sinteno, strikte konforma al la principo de aktiva neŭtraleco, obstaklis la planojn de partipolitikaj faktoroj en UEA kaj, pli grave, ekster ĝi utiligi la lingvon por senĝena politika propagando en la sino de UEA kaj pere de ĝi. La nova soveta linio laŭ la konciza formulo de la t.n. «pacofensivo» en Eŭropo kun samtempa «akrigo de la klasbatalo» — linio iniciatita lige kun la Konferenco de Helsinki en 1973 (v. ĉap. 5 de *HeR*) — postulis vastigon kaj intensigon de politikaj agadoj ankaŭ en ĉiuj iom gravaj internaciaj organizaĵoj, precipe en tiuj, havantaj konsultajn rilatojn kun Unesko kaj/aŭ UN, do ankaŭ en UEA. Oni proklamis min «bastiono de neŭtraleco» — nova titolo en la Esperanto-Movado, pri kiu, se mi entute povus pro titoloj, mi certe pli fierus, ol pri la rezignita iama honora membreco kaj la rifuzita honora prezidanteco en UEA, eĉ se ĝi ne estus radikale ŝanĝinta sian karakteron — kaj organizis senprecedencajn atakojn kaj intrigojn laŭ la bone konataj metodoj por «faliĝi la bastionon». Efektive, dank' al aktiva helpo de la «kunvojaĝantoj» kaj alispecaj subtenantoj, inkluzive miopulojn, kiel dokumentite en ĉap. 5 de *HeR*, la politikaj konspirintoj sukcesis. Hamburgo malfermis la pordon al senbridaj kaj senrezistaj politikaj agadoj laŭ ekstermovadaj direktivoj en UEA mem, kiu tiamaniere objektive perdis sian neŭtralecon jam antaŭ ol la nova Statuto formale konfirmis tion.

Tio estas la tuta senco de la partipolitika flanko de la hamburga puĉo. En tio ankaŭ konsistas la esenca diferenco inter la antaŭhamburga UEA kaj la nuna sub la posthamburgaj gvidantaroj. Personoj, kiuj, fermante la okulojn por ne vidi la realaĵon, plu asertas, ke «ankaŭ pli frue» en UEA troviĝis «neneŭtralaj orienteŭropaj asocioj», *devus fine kompreni la decide gravan diferencon inter la strikta observado de neŭtraleco en la ĉiutagaj agadoj de la Asocio antaŭ Hamburgo, unuflanke, kaj la konstantaj, senhaltaj politikaj agadoj en UEA mem post Hamburgo sen kia ajn rezisto aŭ eĉ nura protesto fare de la gvidaj organoj, aliflanke.*

Fine, utilas memorigi, ke laŭ art. 16 de la Statuto UEA rajtis fari kontraktojn pri kunlaboro kun neneŭtralaj internaciaj Esperanto-Asocioj, kondiĉe ke tiuj rilatoj ne estu en kontraŭeco kun la principo de neŭtraleco difinita en art. 4. Tiamaniere, sen kia ajn kompromitado de sia neŭtraleco, UEA donis al neneŭtralaj Esperanto-Organizaĵoj vastajn eblecojn por kunlaborado kaj entreprenado de komunaj agadoj en intereso de Esperanto kaj por la bono de la tuta Esperanto-Movado. Se, laŭ la leĝoj de siaj landoj, kelkaj Esperanto-organizaĵoj aŭ instancoj tutsimple ne plu rajtis esti almenaŭ parte sendependaj kaj neŭtralaj, sed devis agi politike, ili facile povis fondi sian propran politikan internacian asocion (praktike, kvankam ne formale, ĝi jam ekzistas) kaj fari taŭgan kontrakton kun UEA laŭ art. 16 pri kunagado en difinitaj sferoj. Tio estis la sola lojala kaj honesta solvo, kiun la subskribinto jam plurfoje sugestis kiel elirvojon el la profunda krizo, en kiu ne nur UEA, sed la tuta Esperanto-Movado ĉiam pli sufokiĝas ekde Hamburgo. Nun, pro la nova Statuto, verŝajne eĉ tio ne plu eblas. Kulpas ne tiom la instrukciataj gvidantoj de la politike neneŭtralaj Esperanto-Organizaĵoj kaj instancoj, kiom la gvidantoj de sendependaj Esperanto-Asocioj kaj la pasiveco de iliaj membroj, kiuj ne komprenis, ke kompromisi kaj silenti en tiaj kazoj signifas kompromiti kaj konsenti.

La Novaj Reguloj

Al la pozitiva kritiko, kiun ni faris kaj en aparta cirkulero al la sendependaj landaj asocioj kaj en n-ro 1/79 de *Horizonto*, pri la statutprojekto publikigita en n-ro 12/78 de *Esperanto*, ŝuldiĝas kelkaj formalaj plibonigoj en la nova Statuto, kvankam, kompreneble, tiu fakto ne estas menciita per unusola vorto en la organo de UEA. Ekzemple, en art. 3 inter la celoj nun denove troviĝas la disvastigo de Esperanto, la kreskigo de fortika sento de solidareco inter la membroj kaj la disvolvado ĉe ili de kompreno kaj estimo por aliaj popoloj; en art. 4 estas ellasita la «interalie», jure malebla en tia doku-

mento; en art. 10 estas reenkondukita la jure protekta klaŭzo, ke la Asocio malakceptas financan respondecon pri la funkciado de la servoj; en art. 11 estas aldonita la ero pri la Honora Patrona Komitato, ktp.

Apenaŭ necesas diri, ke kelkaj plibonigoj, per si mem salutindaj almenaŭ el pure formala vidpunkto, perdas sian valoron pro la novaj reguloj pri neŭtraleco.

Art. 5 de la nova Statuto difinas jene la neŭtralecon de UEA:

«UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio kaj sociaj kaj politikaj problemoj, kun la escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj. Tiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj. Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj, estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.»

Niaj komentoj:

(1) La aldono, ke UEA estas «neŭtrala rilate al sekso» estas tute stranga. Se tiu neŭtra formulo signifas, ke UEA rekonas la egalrajtecon de la seksoj — egalrajteco praktikata en UEA ekde ĝia fondiĝo — do ĝi estas superflua, ĉar plene kovrita per la klaŭzo pri la respekto de la homaj rajtoj; se, male, ĝi signifas, ke UEA estas indiferenta (pasiva neŭtraleco) rilate egalrajtecon aŭ seksan diskriminacion, tiam ĝi kontraŭdiras ne nur la klaŭzon pri la homaj rajtoj (v. p-ton 3, sube), sed ankaŭ art. 13, laŭ kiu, almenaŭ teorie, nur landa organizaĵo «vaste malfermita al civitanoj de sia lando... sen ekskluzivo pro sekso» povas aliĝi al UEA.

(2) La ŝanĝo de «...kiuj ne estas lingvaj problemoj» en la projekto de 1978 al «kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj» (mia propono) estas konforma al la reformulitaj celoj (v. supre) kaj tial formale adekvata pro kaŭzoj prezentitaj en *Horizonto* n-ro 1/79 kaj en la menciita cirkulero al la sendependaj landaj asocioj.

(3) La aldono, laŭ kiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj, indikas neinteresiĝon, pasivecon (analizon pri la diversaj signifoj de neŭtraleco en internaciaj rilatoj kaj internacia juro v. en *Internacia Jura Revuo* 1/79 kaj en *Horizonto* 3/79). Kompreneble, ankaŭ tia pasiva neŭtraleco estas ebla, sed, se tiel, en art. 5 ĝin kontraŭdiras jam la sekvanta klaŭzo, laŭ kiu UEA — almenaŭ formale en la nunaj kondiĉoj — ja prenas pozicion deklaramente, ke la respekto de la homaj rajtoj estas esenca kondiĉo por ĝia laboro. Tia kontraŭdiro inter la pasiva kaj aktiva neŭtralecoj, neallasebla en jura dokumento, estis evitebla per simpla ellaso de la aldonita frazo pri neprenado de starpunkto.

(4) Oni akceptis nian sugeston, ke la «homaj rajtoj» estu precizigitaj per «kiel difinitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj», sed oni aldonis «kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj». Tiu plia aldono estas tre malbona. Dum la Universala Deklaracio estas tutmonde rekonita ne nur morale, sed ankaŭ jure kiel parto de publika internacia kutimjuro (alia afero estas la krudaj malobservoj en diversaj landoj), la ceteraj internaciaj aktoj en la sfero de homaj rajtoj — pli ol dudeko da paktoj kaj konvencioj — estas subskribitaj nur de relative tre malgranda nombro da ŝtatoj kaj ratifikitaj eĉ de pli malgranda. Sekve, ili ne havas universalan karakteron kaj tial devis ne esti menciitaj en statuto de tutmonda organizaĵo kun aktualaj aŭ potencialaj membroj en ĉiuj landoj. La Universala Deklaracio perfekte sufiĉis, kondiĉe ke UEA mem ankaŭ sub la nuna gvidantaro respektu tiujn klare difinitajn homajn rajtojn, kiujn ĝi formale rigardas esenca kondiĉo por sia laboro. Tio bedaŭrinde ne okazas kaj ĝi estas unu el la kaŭzoj, pro kiuj UEA regresas sur ĉiuj linioj.

Malgraŭ la mankoj kaj internaj kontraŭdiroj, art. 4 per si mem tamen ne prezentus apartan danĝeron por la neŭtraleco de la Asocio, se art. 13 estus restinta sensanĝa. Sed art. 4 fariĝis komplete sensenca pro la forigo de la principo de neŭtraleco el art. 13.

La nova art. 13 tekstas:

«Por aliĝi al UEA la kondiĉoj por landa Esperanto-asocio estas, ke ĝi plenumas la kondiĉojn priskribitajn en la Generala Regularo, ke ĝi estas asocio laŭorde organizita kaj vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro politika aŭ religia sinteno aŭ raso, lingvo aŭ sekso, kaj ke ĝi skribe konfirmas sian pretecon respekti la Statuton kaj regulojn de UEA, precipe ĝiajn celojn kaj ĝian neŭtralecon. Landa asocio pagas por ĉiu sia membro, kiu ne estas individua membro de UEA, jaran kotizon difinitan de la Komitato.»

Kondiĉo por daŭra aliĝinteco estas, ke la Komitato restas kontenta pri plenumo de la jam difinitaj kondiĉoj kaj deklaro.

Principe UEA akceptas el unu regno nur unu landan asocion, sed la Komitato rajtas akcepti plurajn.»

La lasta paragrafo estas reenkondukita pro niaj kritikaj rimarkoj en *Horizonto*, sed la reenkonduko fariĝas sensignifa pro la forigo de la esence grava klaŭzo de la ĝisnuna

Statuto, laŭ kiu nur landa asocio neŭtrala laŭ la senco de art. 4 povis aliĝi al UEA. Tio signifas, ke eĉ nete malneŭtralaj, politikaj Esperanto-organizaĵoj, aŭ eĉ Esperanto-fakoj de ekstermovadaj politikaj instancoj, nun ankaŭ laŭstatute rajtas aliĝi al UEA kaj resti en ĝi, kio ekde Hamburgo ĝis nun okazadis nur fakte, sed kontraŭstatute, kiel plurfoje kaj abunde pruvite per aŭtentikaj dokumentoj en *Horizonto*. La postulo, ke tia asocio devas esti «vaste malfermita al la civitanoj de sia lando... ktp.» (kio pri la rezidantoj, sed ne civitanoj?) estas tiel naŭva por ne uzi pli fortan vorton, ke ĝi apenaŭ bezonus komenton por tiuj, kiuj estas almenaŭ iom informitaj pri la realaĵo. Kio, do, pri sence-raj esperantistoj, kiuj estis eksigitaj el siaj Esperanto-organizaĵoj kaj persekutataj pro siaj religiaj konvinkoj kaj praktikado de sia religio konforme al la Universala Deklaracio? Kio, ekzemple, pri Sváček kaj Srna, ne nur eksigitaj el la Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj tial el UEA, sed ankaŭ persekutataj kun la helpo de funkciuloj de ĈEA, samtempe de UEA? Ĉu tiuj kaj multaj aliaj kazoj signifas respekton de la Statuto de UEA, precipe de ĝia neŭtraleco? Ĉu la klare politika propagando, kiun regule kaj sisteme faras pluraj «aliĝintaj asocioj» estas konforma al la celoj kaj neŭtraleco de UEA? Kaj kio, finfine, estas UEA, se ne la landaj asocioj kaj la individuaj membroj, el kiu ĝi konsistas? Por ĉiu persono, kiu ne estas komplete blindigita de la konataj propagando kaj agitado, ĉu en UEA mem, ĉu ekster ĝi, estas tute klare, ke UEA ne estas kaj ne povas esti neŭtrala, se granda parto de aliĝintaj asocioj, kelkaj el ili tute ne «laŭorde organizitaj», kaj preskaŭ duono de ĝiaj komitatoj (eĉ pli kune kun la «kunvojaĝantoj») agas malneŭtrale, politike. Kaj kiu saĝa homo povos kredi, ke la Komitato «ne estos kontenta», se la plimulto en la Komitato, plu helpata de la miopuloj, en siaj propraj organizaĵoj agas konforme ĉu al rektaj instrukcioj, ĉu al la ĝenerala politika linio de siaj respektivaj partioj? Kompreneble, kiel ĝis nun kontraŭstatute, tiel same laŭ la nova Statuto la Komitato ĉiam «estos kontenta» (ne tre bona traduko de la angla «satisfied») ke tiuj «landaj asocioj» ja plenumas la difinitajn kondiĉojn kaj deklaron.

Art. 14 kaŝe firmigas unudirektan politikigon

La regulo de art. 14, laŭ kiu nur neŭtralaj internaciaj fakaj Esperanto-asocioj povas aliĝi al UEA, logika kaj necesa en la antaŭa Statuto pro la kondiĉo pri neŭtraleco rilatanta al la landaj asocioj, kontraŭdiras la forigon de la klaŭzo pri neŭtraleco en la nova art. 13 kaj tial estus absurde nelogika, se ĝi kaŝe ne firmigus eĉ pli la unudirektan politikigon de la Asocio.

Kial?

Se oni supraĵe legas art. 14, oni povas ricevi la impreson, ke la nova Statuto, rezigninte pri la neŭtraleco de aliĝintaj landaj asocioj, tamen protektas ĝin en rilato al internaciaj Esperanto-organizaĵoj, kaj tiel almenaŭ formale kaj partete savas la neŭtralecon de UEA. Sed iom atenta analizo de art. 14 en la kadro de la analizitaj novaj reguloj pri neŭtraleco kaj en ligo kun la reala situacio en la Esperanto-Movado, donas precize inversan bildon.

Ĉiuj organizaĵoj en la nuntempa Esperanto-Movado estas divideblaj je 4 ĉefaj grupoj: (1) demokrate organizitaj kaj sendependaj neŭtralaj landaj asocioj; (2) malneŭtralaj landaj organizaĵoj aŭ eĉ nur sekcioj de ekstermovadaj instancoj (ekz. la t.n. «Centra Laborrondo Esperanto», sekcio de la ŝtata-partia Kulturlogo en GDR), politike dependaj kaj finance subtenataj el ekstermovadaj fontoj; (3) sendependaj kaj demokrate organizitaj internaciaj fakaj neŭtralaj organizaĵoj (ekz. la instruista, jurista k.a.); (4) sendependaj kaj demokrate organizitaj neneŭtralaj organizaĵoj (ekz. SAT kaj, ĉefe, diversaj religiaj).

Laŭ la antaŭa Statuto malneŭtralaj kaj neneŭtralaj asocioj [grupoj (2) kaj (4)] ne rajtis aliĝi al UEA aŭ resti en ĝi, se ili transpasis la permesoblajn limojn de neŭtraleco. Efektive, la neneŭtralaj internaciaj asocioj neniam aliĝis, sed ekde Hamburgo ses el la malneŭtralaj landaj organizaĵoj kontraŭstatute disvolvis ampleksajn politikajn agadojn en UEA: por esti justaj, la bulgara, ĉeĥa, slovaka kaj orientgermana multe pli vastajn, ol la pola kaj hungara. Kiel dirite, tio okazis kaj plu okazas sen kia ajn rezisto fare de la gvidaj organoj de UEA, kaj sen kia ajn reago fare de la neŭtralaj landaj asocioj en UEA, precipe ne de la israela, usona kaj brita, kiuj silentis eĉ kiam iliaj propraj demokrataj landoj estis maljuste politike atakataj en organoj de asocioj agantaj en UEA. Temis kaj plu temas pri kunordigitaj aktivadoj laŭ ununura politika linio. Tial, kiel ankaŭ pro la fakto ke sole tiu politika linio estas reprezentita en la Komitato per multnombraj komitatoj, oni povas paroli nur pri *unudirekta* politikigo de UEA.

Ĉar neneŭtrala landa asocio povas nun laŭstatute aliĝi aŭ resti en UEA kaj havi eĉ ses membrojn en la Komitato (art. 23), laŭ la sama logiko oni devis forigi el art. 14 la klaŭzon pri neŭtraleco kaj permesi aliĝon ankaŭ al neneŭtrala internacia asocio, kiu en ĉiu okazo, eĉ se ĝi havus pli ol mil membrojn, ne povus havi pli ol nur unu membron en la Komitato (art. 23). En la aktuala situacio tio estus povinta rilati pure teorie nur al SAT kaj praktike eble al iuj el la aliaj neneŭtralaj organizaĵoj, ekzemple al la katolika, kristana, kvakera, ev. Oomoto, kies organoj kaj periodaĵoj okupiĝas nur pri senofendaj religiaj aferoj. Tiun ŝancon, kiu estus povinta almenaŭ iom mildigi per kontraŭpezeto la nunan sole unudirektan fortan politikigon, eksplicite malebligas la nuna art. 14

malpermesante aliĝon de neneŭtralaj internaciaj asocioj. Ĝi malebligas ankaŭ al eventuale estontaj internaciaj neneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj — ekz. iu demokrata socialisma, aŭ liberala, aŭ simila politika — aliĝi kaj eventuale eĉ iom pli kontraŭpezigi la nunan ŝtalan politikan blokon, nome variigi la malneŭtraliĝon.

Kompreneble, ankaŭ tia diverstendenca malneŭtraliĝo estas malutila por la celoj kaj tial malbona por asocio kiel UEA, sed certe malpli malbona, ol la nuna unudirekta politikigo. Tial art. 14 en kunteksto de la nuna Statuto kaj en la nuna stato de la Esperanto-Movado, anstataŭ protekti la restaĵojn de neŭtraleco, kiel unuavide povus ŝajni, fakte fortikigas unuflankan politikigon, kiu fariĝos eĉ pli peze sentebla, se pliaj samspecaj politikaj «landaj asocioj» (alipolitikaj ne ekzistas) aliĝos al UEA, kiel oni povas atendi.

NOVA TEORIO KAJ NEPLENUMITAJ PROMESOSJ

Eĉ D-ro Tonkin, la nuna prezidanto de UEA, ne kapablis nei la multnombrajn faktojn pri malneŭtraleco en UEA prezentitajn en *Horizonto*. Li, do, sentis sin devigita lanĉi novan, absolute unikan teorion, laŭ kiu la «centra UEA» restas neŭtrala. La prezidanto de UEA diris laŭvorte:

«Car pluraj voĉoj levigis, kiuj deklaras, ke UEA iel forlasas la neŭtralecon, necesas ree emfazi, ke la neŭtraleco de la centra UEA restas netuŝita kaj netuŝebla. UEA estas, kaj devas esti neŭtrala». (*Esperanto*, n-ro 10/79, p. 169).

La nova teorio ankoraŭ ne estas kaj verŝajne neniam estos ellaborita. Tial ĉio estas obskura. Ekzemple, kio estas la «centra UEA»: ĉu la Estraro, ĉu ĝi plus la Komitato, ĉu ankaŭ la CO aŭ sole la CO? Ne estas klare, ĉu la «centra UEA» inkluzivas la delegitan reton kun delegitoj nomitaj aŭ aprobitaj de partipolitikaj instancoj, aŭ nur la delegitojn laŭstatute libere elektitajn, ktp. Plue, la aserto implicite rekonas, ke la «periferia UEA» ne estas neŭtrala. Kia, do, estas la rilato inter la nedifinita kaj kvazaŭe «neŭtrala centra UEA» kaj la klare identigita malneŭtrala granda parto de la «periferia UEA», potence reprezentita en la «centra UEA» per multnombraj komitatanoj elektitaj aŭ nomitaj laŭ partiaj kriterioj. Vere, eĉ iom maturaj infanoj ne povus kredi al tiel naivaj dormigaj fabeloj. Tamen, verŝajne troviĝos sufiĉe multaj esperantistoj, eĉ sinceraj esperantistoj, kiuj volonte aŭskultos ilin por agrable endormiĝi kaj plu trankvile dormi. Aliaj, feliĉe ĉiam pli multnombraj, preferas formi siajn opiniojn surbaze de faktoj, ol kredi al belaj, senenhavaj vortoj. Tial, memorigo pri kelkaj faktoj el la pasinteco povas nur kontribui al ĝusta juĝo pri la vera sinteno de la nuna prezidanto kaj aliaj funkciuloj de UEA koncerne la neŭtralecon de la Asocio.

En 1969, lige kun la TEJO-Rezolucio de Tyresö, D-ro Tonkin emfazis la «propran ideologion de la esperantista junulara movado kaj ĉefe la sencon de ĝia neŭtraleco», do, evidente, «neŭtraleco» malsama de tiu de UEA. En n-ro 1/70 de *Kontakto*, organo de TEJO, estis dirite, ke la «neŭtraleco trovis sian ekstremman, preskaŭ absurdan, esprimon en la Statuto de UEA» kaj ke la «elŝiriĝo /en Tyresö/ el la kasteca neŭtraleco» ne multe valoras, se ĝi kondukas «nur al senlira strateto de la ŝajna revolucio», kio klare indikas, ke la Rezolucio devis konduki al efektiva «revolucio». Lige kun la incidentoj dum la kongreso de TEJO en Graz (1970) la sama *Kontakto* skribis pri «mucida neŭtraleco, kiu tiel senefikigas la plenkreskulan movadon», dum en n-ro 3/73 ĝi nomis la tiaman aktivan neŭtralecon de UEA «morta mefito», «forĝesita miozoto» kaj «kadavro», kiun nur «en kelkaj 'maturaĝaj' rondoj oni ankoraŭ priŝparas kaj palpetas» ktp. Samtempe *Kontakto* daŭre publikigadis unudirektajn politikajn artikolojn laŭ la «propra ideologio» de la tiama gvidantaro de TEJO, kiu ĉu rekte, ĉu pere de siaj sekcioj entreprenis tutan aron da evidente politikaj agadoj. Kompreneble, la tiama Estraro de UEA firme reagis ankaŭ en tiuj kazoj, kiel detale dokumentite en ĉap. 5 de *Hamburgo en Retrospektivo*, dum la nuna Estraro, same kompreneble, aprobe silentas rilate la samspecajn posthamburgajn malobservojn de neŭtraleco en TEJO, junulara sekcio de UEA. Eĉ pli, laŭ art. 31 de la nova Statuto TEJO rekone rajtos «elekti» de 1-4 Komitatanoj A, preskaŭ certe 4, kio en la nuna situacio signifas plian fortikigon de la politika bloko en la Komitato. Necesas aldoni, ke en la tempo de Tyresö kaj poste H. Tonkin estis prezidanto de TEJO, ke S. Milojević, la nuna redaktoro de *Esperanto*, estis membro de la redakta komitato de *Kontakto*, ke F. Szabó, nun en la Estraro de UEA, troviĝis tiam en la Estraro de TEJO, kaj ke nombro de aliaj atakantoj de la neŭtraleco de UEA nun estas membroj de ĝiaj Komitato kaj aliaj organoj.

Tamen, laŭ la nova teorio de D-ro Tonkin, la «centra UEA» restas neŭtrala kaj en 1975 — ni ripetas — la Komitato eĉ oficiale deklaris en aparta Rezolucio, ke «la politika neŭtraleco de UEA, kiel ĝi estas priskribita en artikoloj 4 kaj 13 de ĝia Statuto /t.e. la antaŭa Statuto/ ĉiam estis, kaj ĉiam restos la fundamenta gvidprincipo de ĝia tutmonda agado kaj daŭre konsistigos la netuŝeblan bazon de ĝia ekzistado» (*Esperanto* n-ro 9/75, p. 142, nia substreko).

Oni, eble, povis pensi, ke la samaj personoj, kiuj tiel negative rilatis al la neŭtraleco de UEA antaŭ Hamburgo, subite konsciiĝis pri ĝia decide grava signifo kaj tial promesis, ke ne nur art. 4, sed ankaŭ la esenca art. 13 restos por ĉiam neŝanĝitaj kiel neŝanĝebla bazo de la ekzistado de UEA. Nun tiu «mucida» neŭtraleco, tiu «kadavro», kiu

en 1975 subite fariĝis «neŝancebla bazo» por la ekzisto mem de UEA, estas ankaŭ formale forigita el la Statuto tra la reformulita art. 13, kio konsistigas plian krudan malobservon de propra promeso. Sed tio ankaŭ signifas, ke la tradicia ĝishamburga neŭtraleco de UEA nun fakte fariĝis kadavro, kiun la nova Statuto pompe entombigis.

—oOOo—

En tiu ĉi artikolo ni limigis nin al la demando de neŭtraleco. Pri la aliaj, relative malpli gravaj, kontraŭdiroj, mankoj (ekz. la limigo de la rajtoj de la individuaj membroj laŭ art. 24) kaj malfortaj flankoj de la Statuto eble alian fojon. Por eviti kian ajn miskomprenon, estu ĉi tie eksplicite dirite, ke la esprimo «malneŭtralaj» landaj organizaĵoj en la artikolo neniel rilatas al tiuj tre multnombraj esperantistoj en la koncernaj landoj, kiuj mem estas malkontentaj aŭ eĉ suferas pro la altruditaj politikaj agadoj de la altruditaj gvidantaroj. Estu ankaŭ dirite, ke eĉ en la gvidantaroj parte troviĝas sinceraj esperantistoj, kiuj faras sian eblon por disvastigi la lingvon malgraŭ la olbstaroj en tia klimato. Ankaŭ pri tio, eble, alian fojon.

En la nuna momento, post la akcepto de la politike kompromita Statuto, la plej urĝa tasko — mi eĉ kuraĝos diri devo — de ĉiuj Esperanto-parolantoj, plu fidantaj je la mirindaj praktikaj kaj ideaj valoroj de la neŭtrale-homa Internacia Lingvo, estas kolektiĝi ĉirkaŭ *Horizonto* kiel la ĉefa sentinelo kaj laŭtparolilo de la neŭtrala Esperanto-Movado, aboni la revuon, diskonigi ĝian enhavon, havigi al ĝi novajn abonantojn kaj financan helpon. Tio estas la sola vojo por manifesti kaj atesti ankaŭ al la ekstera mondo la pluan ekziston de la partipolitike neŭtrala esperantismo.

Ivo Lapenna

ANKAŬ VI ELIZIAS

Ne refutu. Ĉar se vi protestas 'Mi neniam elizias!', jam per tio vi vin perfidas, ĉar por ricevi la vorton 'elizias' vi devis fortondi la 'o' en 'elizio' kaj aldoni -as. Se vi iras en salonon plenan de fumo kaj krias 'Kia fuma atmosfero!', ĉu tiu 'fuma' ne estas propradire *fumo-a*, en kiu vi eliziis la -o de la substantivo? Fuma = fumoplena, ne vere? Kaj se vi diras, kun eleganta vervo, ke en tiu ĉambro oni cigaredas, pipas kaj cigaras, ĉu vi ne, en tiuj graciaj fleksioj, elizias eĉ trifoje la -o de la substantivo? Vi povas eĉ petoli per la gramatika tabelo, deklamante 'fumo, fuma, fume, fumi,' kun elizio en tri el la kvar formoj, kaj konstati, kiel tiu kvarvorta litanio akcentas la forton de la nuda radikilo. Fum-o, fum-a, fum-e, fum-i...

La elizio estas ja profunde radikita en la dinamiko de nia lingvo. Estas neeble ĝin eviti. Se mi diras *skribotablo* anstataŭ *skribotabla* mi jam elizias. Kaj ne temas nur pri -o. 'Virinsocieto' ja ne estas 'virino-societo' (societo de unu virino), sed 'virinoj-societo' en kio ni elizias -oj: afero ne menciita en nia gramatiko. Esperanto estas nome pli subtila kaj pli mirinda, ol supozas la plimulto de ĝiaj adeptoj. Ekzemple la nocion virinsocieto oni povas esprimi en tri manieroj: jen unuvorte, *virinsocieto*; jen duvorte, *virina societo*, kaj jen per trivorta prepozitivo, *societo de virinoj*, paŭsante respektive la sintaksajn formojn de diversaj nacilingvoj: la aglutinaj, la fleksiaj kaj la izolaj (laŭ Drezon 'amorfaj').

En vorto kiel 'nacilingva' oni elizias eĉ dufoje, ĉar la vorto signifas propre nacilingvo-a: apartenanta al la nacia lingvo. 'Buĉado' estas 'buĉi-ado', kaj 'hombuĉado' estas precize 'homojn-buĉi-ado', elizio ne de -o, sed de plurala akuzativo -ojn kaj infinitivo -i en la kadro de unu vorto! En *plenplena* kaj *finfine* ni elizias adverbos (plene plena, fine-fine), en *hezitema* verbon (ema heziti), kaj en *vidinda* eĉ pasivan infinitivon (inda *esti vidata*)! Tiaj kombinoj estas elipsaj kaj postulas konjekton, ĉar dum *vaporforto* estas nur 'forto de vaporo', *vaporŝipo* estas 'ŝipo (funkcia) per vaporo'. Do la vortfardo ne nur enhavas elizion, sed iufoje liveras formojn malpli diafanajn, ol la plurvorta alternativo.

Se ni konsideras la paralelajn formojn *tribestro* kaj *triboĉefo* ni konstatas, ke ankaŭ ĉe afiksoj oni rutine elizias certajn elementojn, alie ni devus diri plene 'tribo/estro, bovo/ino (kp. bovo/viro²), piano/isto, junaj/uloj, klara/igi, naski/igi, lerni/ejo, kaj sama/ideo/anoj!'

Nu, ĉe elizio tiel vasta kaj varia, penetranta la tutan lingvon, ŝajnas sufiĉe nature, ke Zamenhof legitimis la elizion ĉe opaj vortoj, samtempe limigante tion, tre saĝe, al la artikolo kaj al la substantivo nur singulara kaj nominativa. Se ni volas diskuti la esperantan elizion, ni do rigardu ĝiajn plurajn formojn, kaj konsideru kiagrade ili kontribuas al klara komunikado. Entute oni povas konkludi, ke la eliziojn de artikolo kaj nuda substantivo, de vortfleksado kaj de vortkunmeto, oni ne uzu tro dense, kiel oni ankaŭ ne trouzu la prepoziciajn esprimojn.

Kaj se vi volas insisti, ke vi ne elizias, bonvolu specifi kiujn tipojn de elizio vi ne uzas, ĉar aliajn tipojn certe jes.

Reto Rossetti

KOMENTO DE LEGANTO

La artikolon «Analizo de kelkaj aspektoj de la demando pri -io kaj -ujo» de Bernard Golden en «Horizonto» n-o 22 (julio-aŭgusto 1979), p. 84-86, mi legis kun granda intereso.

Mi ne volas fari nun ĝeneralan kontribuon pri la demando pri -io kaj -ujo, sed nur rimarkigi ion pri unuopa radikoj, nome *aŭstr-* resp. *Aŭstri-* kaj ties signifo kaj karaktero.

En la nomita artikolo la aŭtoro sub «2. Gentoj kaj landoj» (p. 84, kvara alineo) citas opinion de *Zamenhof*: «Zamenhof, en sia memuaro 'Gentoj kaj Lingvo Internacia' ... nomas la enloĝantojn de Aŭstrujo germanoj, tiel montrante, ke liaopinie *aŭstr-* ne povas esti gentnomo». — Tiun ĉi opinion de *Zamenhof* oni povas kompreni nur surbaze de la cirkonstancoj antaŭ la 1-a mondmilito kaj rilate al la tiama Aŭstrio. Kiel konate, Aŭstrio tiam estis granda ŝtato kaj ampleksis pli ol dek diversajn gentojn. La komuna nomo por ĉiuj estis «aŭstrianoj», kaj por distingi la diversajn gentojn oni kutime parolis pri ĉeĥoj, italoj, slovenoj, germanoj ktp., rilatigante sin precipe al la *lingvo*. Almenaŭ koncerne al «germanoj» tiu iom simpligita esprimmaniero do estas erariga, ĉar lingva aparteno unuflanke kaj genta (etna) aparteno aliflanke ja ofte kongruas, sed ne ĉiukaze *devas* nepre kongrui.

Post la jaro 1918 la politikaj cirkonstancoj kaj ŝtataj limoj en la mezo de Eŭropo funde estis ŝanĝitaj. Aŭstrio estis reduktita al sia germanlingva parto (kun kelkaj etnaj minoritatoj), kaj sekve la termino «aŭstro» aŭ «aŭstrianoj» povas esti aplikata jam nur al la loĝantoj de la nuna Respubliko Aŭstrujo/Aŭstrio. Cetere, la historia esploro montras, ke la germanlingvaj aŭstroj malgraŭ la lingva (kaj parte kultura) parenceco al la aliaj germanlingvaj etnoj (en Germanio kaj Svisio) havas la karakteron de propra, memstara gento. Komprenibile tiu aŭstra gento, en sia nuna konsisto, formiĝis dum multaj jarcentoj el pluraj komponantoj (iliroj, keltoj, romianoj, slavoj, ĝermanoj ktp.), sed simila kunfandiĝo okazis ankaŭ ĉe la plej multaj aliaj gentoj (ekz. la franca, hispana ktp.), kiuj ankaŭ ne estas komplete homogenaj laŭ sia estiĝo.

Fakto estas, ke la nacilingvaj radikoj («Österreich» en la germana, «Austria» en la latina kaj multaj latinidaj lingvoj, sed ankaŭ en la angla) signifas la *landon*, kaj de la landnomo oni derivas la nomon de la loĝantoj. Mi tamen opinias, ke ni ne estas devigitaj transpreni en nia kazo tiun sistemon ankaŭ en Esperanton. Tre ofte la terminoj en Esperanto kaj ties deriva sistemo estas ja pli logikaj aŭ pli avantaĝaj ol la vortfado en naciaj lingvoj.

Se ni do ekkonas, ke la aŭstroj jes estas gento — kion oni ankoraŭ ne tiel klare konsciis en la tempo de *Zamenhof* — estus plej logike; uzi la radikon *aŭstr-* paralele kiel ĉe aliaj gentoj (ekz. hungar-, ital-, pol-, ktp.). De ĝi oni povas derivi la landnomon: Aŭstrio/Aŭstrujo (same kiel Hungario/Hungarujo, Italio/Italujo ktp.). «Aŭstrio» do ne estas, tiukaze, esperantigo de la latina landnomo «Austria» (radiko *Aŭstri-*), sed apude de la laŭfundamenta deriva formo «Aŭstr-uj-o» derivaĵo de la radikoj «aŭstr-».

Avantaĝo de tiu ĉi derivado estus — krom la unuecigo kun la plej multaj aliaj eŭropaj landoj — bona ebleco, lingve distingi inter la anoj de la etnaj minoritatoj kaj la majoritato. Dum la anoj de la majoritato germanlingva povas esti nomataj «aŭstroj», la minoritatoj — same kiel ĉiuj enloĝantoj — estas «aŭstrianoj». (Laŭ la fundamenta derivmaniero kun -uj ankaŭ «aŭstrujano» devus esti allasebla.) Do ekz. sloveno vivanta en suda Karintio ne estas «aŭstro», sed «aŭstrianoj». Aliflanke, kaj simetrie, la germanlingvaj loĝantoj de Suda Tirolo/Alto Adige en Italio, kiuj estas laŭgente samaj kiel la loĝantoj de la aŭstria lando Tirolo, estas aŭstroj kaj samtempe italianoj (italujanoj), sed ne italoj (en etna senco).

Do, laŭ mia opinio, Seppik en sia artikolo citita de Golden, tute pravegeble uzis la radikon «aŭstr-» por nomi la popolon de Aŭstrio.

Klaus Perko

LA POSTMARKKOLEKTADO 1979

La kolektado donis por la Neŭtrala Esperanto-Movado 1600 danajn kronojn = ĉ. 19000 pesetojn. Ni kore dankas al ĉiuj kontribuintoj el kiuj precipe al: 1) fraŭlino Sirkku Koivu, Finnlando; 2) d-ro André Vedrine, Francio; 3) Oomoto; 4) s-ro Bertram Potts, Nov-Zelando kaj 5) s-ro Augusto Garcia Breque, Argentino.

La mono enveninta en 1979 superas 1978 per 600 d.kr. Gis nun ni ne donis premiojn. La tri plej bonajn kontribuontojn por 1980 ni sendos po unu ekzempleron de nia tabua libro «Hamburgo en Retrospektivo» de prof. Ivo Lapenna.

GÜNTHER BECKER 50 - JARA

La estinta ĝenerala sekretario de UEA, S-ro Günther Becker, fariĝis 50-jara la 25-an de januaro. Li naskiĝis en 1930 en Elversberg, Sarlando, kiu en tiu tempo kaj poste ĝis 1935 estis administrata de la Ligo de Nacioj. Eble tiu fakto kontribuis al liaj inter-naciismaj sentoj ekde la infanaĝo.

Tuj post la milito, apenaŭ 15-jara, li ellernis Esperanton el hazarde trovita kurso en popolaltlerneja enciklopedio el la 20-aj jaroj. Kiel li mem ofte diris, lin ĉefe inspiris la humaneca ideo de tuthomara, neŭtrala lingva komunikilo, sed poste li estis kaptita ankaŭ de la mirinda, logika strukturo de la lingvo. Surbaze de Esperanto li studis konsiderindan nombron da aliaj lingvoj kun rimarkinda sukceso. Estas interese noti, ke tri el liaj ĉefaj profesoroj sciis ankaŭ Esperanton: la unua en la porisntruista seminario, la dua en franca universitato, kie Günther Becker studis la francan, italan kaj rusan, kaj la tria en la Universitato de Sarlando, kie li daŭre studas fonetikon kaj lingvistikon.

Liaj agadoj por Esperanto estas multflankaj: kursoj en popolaltlernejoj, artikoloj, intervjuoj, tradukoj kaj diversaj funkcioj en la Esperanto-Movado (dum multaj jaroj prezidanto de Sarlanda Esperanto-Ligo, prezidanto de TEJO de 1956-1964, ĝenerala sekretario de UEA de 1964-1974). Kune kun sia edzino Maria Becker-Meisberger li lastatempe tradukis *L'Esperanto* de Prof. Janton kaj *Esperanto: Ĉu Eŭropa aŭ Azia Lingvo* de Claude Piron en la germanan.

Al lingvoinstruisto Günther Becker tutkoran gratulon kaj ankoraŭ multajn jarojn da sukcesa profesia laboro kaj fruktodonaĵ agadoj por Esperanto.

Kiel premiso al la ĉeftemo de la Konferenco en Strasburgo...

PERFIDO DE KLERULO!

En la rubriko FORUM de la gazeto «LE MONDE» aperis la 8-an de januaro artikolo de prof. Edmond Ferenczi (ĉe la Libera Universitato de Bruselo) sub la titolo «Eŭropo, Babel-Turo?».

«Montriĝis, li skribas, ke la artefaritaj lingvoj — kiel Esperanto — ricevas nenian aliĝon tiagrade, ke ilia utiligo estas eĉ ne studata. Efektive, se oni donas al si la gigantan penon serioze ellerni fremdan lingvon, estas por aliri samtempe al nova kulturo nutrita de miljaraj historio kaj literaturo kun la celo plivastigi la horizonton de la realaj konoj koncerne al la homo. El inter ĉiuj «historiaj pezecoj» tiu de la lingvo estas la plej grava. Ĉiu lingvo havas proprajn bildaron, humuron kaj malsame strukturigas la pensadon; ĉiu vorto, ĉiu dirmaniero esprimas iun civilizacion.»

Tiel en kelkaj universitataj medioj oni daŭre citas Esperanton por plej bone subfosi ĝin! Kaj nun, kiam por Eŭropo la lingva problemo tiel akriĝas, estus dezirinde, ke tuta reto da esperantistaj profesoroj el diversaj universitatoj tuj repliku al tiaj malpravaj asertoj, same kiel faras prof. Pierre Janton en «L'espéranto» n.º 1511 de la Kolekto «Kion mi scias?».*

«Post spertado (dum tri kvaronoj de jarcento) iom post iom plivastigita al ĉiuj landoj, li skribas sur la 110-a paĝo de sia verketo, la pruvo estas farita, ke artefarita lingvo povas esprimi ĉiujn riĉaĵojn de la animo, kiam ĝi kapablis kiel Esperanto estigi kaj disvolvi la sian. Pri arto kaj belo la artefariteco ne estas ligita al la strukturo de la lingvo. Pro la sukceso de beletro en Esperanto ne plu eblas tion nei honeste. «Ĉu Esperanto estas destinita por doni artverkojn, por doni beletrajn ĉefverkojn?» demandas G. Duhamel**, kiu respondas tuj: «Mi kredas, ke Esperanto povos iam okazigi esceptajn verkojn kaj destinitajn por vasta publiko diversa...»

Se ĝi ne havas ian Shakespeare nek Dante, enestas esence propra al ĝia konsisto nenia lingva aŭ arta kaŭzo, kies efiko forigis la eblecon, ke ĝi iam havos tiajn homojn. Malmulte da lingvoj, cetere, povas fieriĝi pri tiaj nomoj, kaj la plimulto el la nun parolataj estas for de la kapablo egali la laŭreat-liston de Esperanto...

Ĉi tiu vivo de projekto, kiu povintus, kiel centoj da aliaj, resti malviva litero, konsistigas eksterordinaran fenomenon en la lingvaj aferoj. Sur la beletra kampo ĝia graveco venas de la fakto, ke ĝi rerajtigas la konstruitajn lingvojn kiel vehiklojn de kulturo kaj arto, kaj relativigas la nocion de artefariteco...»

Jean Thierry

* (en la franca) ĉe PRESSES UNIVERSITAIRES DE FRANCE.

** Georges DUHAMEL, verkisto 1884-1966.

BELETRO

GLORIA FUERTES naskiĝis en Madrido (laŭ ŝi: je la aĝo de du tagoj), en 1918. Nun, ŝi estas unu el la plej bonaj hispanaj verkistinoj, precipe kiel poetino, kaj lastatempe pro siaj historioj kaj rakontoj por infanoj. Tre konata estas ŝia laboro en TVE, kie ŝi laboris por la programo «Un globo, dos globos, tres globos». El ŝia libro «Obras incompletas» ni elprenis la du jenajn poemojn, por kies eldono ni ricevis personan permeson far la aŭtorino.

PENTRITAJ FENESTROJ

Mi vivis en domo
kun du fenestroj veraj kaj aliaj du surmure pentritaj.
Tiuj pentritaj fenestroj kaŭzis mian unuan doloron.
Mi palpis la muron de la koridoro
klopodante trovi la fenestrojn ene.
La tutan infanecon mi pasigis kun la deziro
elrigardi, por vidi kion videblas,
tra tiuj fenestroj neekzistantaj.

KIA RENKONTO!

...mi ekkuras senpripense
freneze
kaj ekrenkontas Dion.
—Kien iras vi Leocadia? — Tiel li ofte nomas min—.
Poste Li... konvinkas min silente,
turnas min en kolombinon,
nomumas min vaganta kavalirino,
armas min per paco kaj scienco
kaj forprenas el mi la emon al sinmortigo.

Traduko far: LIVEN DEK



El la jugoslava literaturo

SOLECO

Kajetan Kovič

Neniu. Nur strato kaj mi.
Neĝo, neĝo faletas.
Mondo eta, diafana, silentas
kiel menor' kiu, post morto kvietas.

Neniu. Nur strato kaj mi.
Ĉiuj finiĝis sur tiu ĉi spuro:
panjo, fratin', frat'kaj amatin';
najbaroj, la patroj kaj avoj.

Neniu. Sola mi iras post ili,
laŭ vojo, tro frue mortlaca.
Nur neĝo, neĝo senĉese sur min
ŝutas la florojn de la glaci'.

Trad. Tone Logar

SANDALOJ DE SULTANO

Ivan Cankar

Jen, veziroj kaj paŝaoj
surgenuis antaŭ li:
«Glor', sultano Ibrahimio!
Antaŭ vi kliniĝas ni.

Antaŭuloj, eksidintaj
Sur la tron' de sama kred'
ĝis genu' vin ne atingas;
nek profeto Mahomet'!

Ho, jes, kaj kiam Alahio
prenos paradizen vin,
kiu tiam ja kompatos
etajn mizerulojn nin?»

Gemis ili kaj ploradis
ĉiam pli. Kaj jen la don':
Li sandalojn jam forprenas
metas ilin al la tron':

«Ho, ne ĉesu vi, infanoj!
Iras mi haremen nun;
estas ja ĉi la sandaloj.
Ilin ekhonoru, dum!»

Gemis ili kaj ploradis
ĉiam pli kaj ĉiam pli:
«Ho sandaloj, nia ĝojo,
paradizo, nia di'!»

Kaj eksaltas la sultano
kaj ekkrias al vizaĝ':
«Hu, vi stultaj perfiduloj,
kie estas via saĝ'?

Ibrahimio sur la trono.
Suno, reĝo, estas li!
Sur la trono la sandaloj;
ili estas via di'!

Venu, Omar, pelu ilin
tra la urbo, for el hal'.
Sklavoj estas vi, ĉar via
dio estas la sandal'!»

Trad. Tone Logar

VUNDITOJ

Kajetan Kovič

Vundoj eksangu
kiel grandaj floroj
de poetoj,
amatoj,
infanoj,
vagabondoj
kaj mortaj soldatoj.

Sub tolo de nokt'
kaj tagoj sensencaj;
sub ŝelo de amo
kaj etaj sukcesoj
eldiras la kor'
kanton pri velo,
kanton pri maro,
kanton pri vento.

Ni ronĝu la krustojn cikatrajn!

Fluu
la sango de amo;
fluu,
la sango anĝela
de falsaj profetoj;
fluu
peze kaj malhele,
disrevite la sang'!

Kanto pri velo.
Kanto pri maro.
Velo en fundo de mar'.

Trad. Tone Logar

PAŬLO LA FETORA

—Bonhumora Rakonto— (j. 1962-a)

Ankoraŭ ne brilis elektraj lampoj super la stratoj, nek ronronis aŭtomobiloj, nek zumis aeroplanoj, nek policanoj staris ĉie kiel stratlanternoj kiam Paŭlo troviĝis inter la vivantoj. La lasta jarcento ne havis eĉ en sia fino, tiom da bruo nek da distriloj kiom la nuna. Tamen eĉ en etaj, izolaj vilaĝoj, kiujn ne atingis la urbaj sensaciaĵoj, ne mankis io, kio okupadis la homojn. Iu persono, en diversaj aĝoj, povis esti la sufiĉa motivo tenadi en varia eksciteco sian popoleton laŭlonge de sia vivo. Unu el tiaj homoj estis Paŭlo, seneduka, ne instruita, kruda sed sprita. Li ne ludis per pilko, —pilkoj preskaŭ ne ekzistis— sed per pistoloj. Liaj gepatroj penadis moderigi lin, sed ne efikis ama konsilo, nek akra riproĉo nek severa bato.

Tiam ne brilis elektraj lampoj, sed rebrilis mizero en vilaĝoj. Simpla monero valoris tiom, kiom nuna tricifera monbileto; sed kiel akiri monerojn? Kiel nun, ankaŭ tiam sen mono nenion oni povis fari. Tial Paŭlo venis ofte al siaj geonkloj —riĉetaĵ— kvazaŭ humilega almuzolo plende lamentanta pro sia senmoneco. Tiel ofte tio okazis, ke onklo kaj onklino reciproke al si ĵuris, ke de tiu momento nepre ili ne donos plu eĉ unu moneron. Jam sufiĉe. Ambaŭ minace avertis unu la alian pri la grava peko rompi la ĵuron.

Jam plurfoje Paŭlo estis promesinta ne veni plu, sed kiam lin puŝis bezono, li reiris por mono:

— Kara onklo, karega oĉjo, ĉu do vi ne plu amas min? Kiel mi faros sen mono?

— Ne insistu! Ni ĵuris ke tio finiĝis; sufiĉe jam, diboĉulo!

— Kara onklo, kredu al mi: Mi volas boniĝi kaj ĵuras solene ke tiu ĉi fojo estas la lasta.

— Vi diris, ĵuris, ke la lasta fojo? Ĉu lasta? Benon al vi! Nu, mi donas duoble, sed ĵuru ankaŭ, ke vi nenion pridiros al onklino! Se vi estos maldiskreta, malbenon al vi! Vi kaŭzos malpacon en nia hejmo.

Ricevinte la monon, li kisis lian manon, kaj... nova penso spronis lin: Reciti sian litanion aparte al onklino:

— Kara onklino, karega onjo, se vi min amas, helpu min! Kiel mi faros? Pro nia sankta patrono, almenaŭ unu moneron!

— Ne eble. Mi eĉ ĵuris kaj mi ne volas damniĝi.

— Tre kara onklino, ĉu lastafoje vi ne helpas min? De nun mi estos deca kaj ĵuras solene, ke tiu ĉi fojo estas la lasta lasta.

— La lasta, vi diris? Ĉu vere la lasta? Kaj vi ĵuris? Estu benita, malsaĝa nevo.

Mi donas trioble, sed aŭdu bone, eĉ ne unu vorton al onklo! Se vi estos maldiskreta, diablon al vi, ĉar estos katastrofo en nia domo.

Tiel Paŭlo ricevis kvinoblan sumon kaj la sekreto ne bezonis plian ĵuron. Kun tintanta mono en poŝo, li povos partopreni la ĉefan feston de la vilaĝo honore al sankta patrono; sed ve! Pro diboĉaĵo li estis punita de la patro pasigi la noktojn hejme dum tiuj festoj. Kontraŭ la puno li ne longe protestis ĉar li ne intencis plene obei; jam aliffoje li senplumigis kokinon ne vekante mastrinon, ĉar li elŝtelis sin nudpiede kun ŝuoj en mano kaj en mallumo, singarde, tiel sekrete, ke neniu sciigis. Tiel same je noktigo, kun si a pistolo (ĉar abundis drinkuloj) li elŝtelis sin rekte al dancejo.

Acidan mienon li havis, ĉar tial li devis veni malakurate al balo kaj ankaŭ pro la ebla «prediko» de la patro. Pro kolero, envio aŭ ĵaluzo li iris malsupren (la dancejo estis sur unua etaĝo) kaj Paf! Paf! Du kuglojn kontraŭ angulo. Kugloj pafiĝis for, ankaŭ lia kolero. La terurigaj pafoj en la nokto kaŭzis en la dancejo ĝeneralan konsternon. Cesis la muzikado, oni sin demandis, kio okazas? Ĉu mortigo? Kiu? Kial? Neniu respondo, mistero. Pluraj fraŭlinoj svenis (laŭsuspekto, por esti pli facile prenitaj). La pafoj finigis en la nokto multe pli frue la balon, kaj ankaŭ pli frue ol kutime oni reiris hejmen; sed kiu, kial pafis? Dume, Paŭlo senkolerigite per sia heroaĵo iris al drinkejo, kie baldaŭ aliaj kun li komentariis la pafadon kaj antaŭsupozis viktimon. Tie li renkontiĝis kun siaj du plej intimaj kolegoj dividintaj kun li nombrajn diboĉaĵojn. Ili reciproke toleris al si eĉ la plej krudan ŝercon, kaj neniam interdisputis. La drinkejmastro vidis ke Paŭlo estas kontenta. ke la rondo spiras bonan humoron, kaj li enhavis ideon:

— Karaj kolegoj, honore al Sankta Patrono, hodiaŭ mi vin invitas trinki pokaleton da speciala vino, plej rafinita. Jen, Paŭlo, trinku la unua.

Paŭlo ekprenis la pokaleton, proksimiĝis ĝin al buŝo kaj... ekflaris vinagron. Serene, sengrimace li glutis ĝin. La mirigita mastro demandis: Ha! Kion vi diras?

— El kiu puto vi ĉerpis tian ambrozion? Mi volus droni en ĝi!

La mastro turnis sin al dua kolego:

— Nun vi, mia kara.

Tiu ekflaris la vinagron, kaj mil pensoj galopis en lia kapo. (Paŭlo glutis ĝin, ankaŭ mi glutu!) Kaj per unu tiro li eltrinkis ĝin. Gojmiene li klakigis la langon: Ha! Kiel bongusta, neniam mi trinkis tian!

La du trinkintoj rigardis unu la alian mirigite pro la spontana komploto kontraŭ la tria. La mastro etendis la manon al tiu:

— Prenu, amiko, kaj trinku je nia sano.

Flarinte vinagron li rapidigis la pensojn. (Nu, ili trinkis, do ankaŭ mi!) Kaj same per unu tiro li eltrinkis; poste, sengrimace, trankvile, ŝovante la langon sur la lipoj, li aldiris: Per anĝela vino vi regalas nin, kara mastro; kial vi ne trinkas kun ni?

La du kolegoj aprobis la sugeston kaj trivoĉe ili trudis: Jes, jes, kara mastro, vi estas pli dika, trinku do grandan pokalon je nia sano, kaj honore al Sankta Patrono, ni petas vin! Neniam vi trinkis tian!

Ili mem plenigis la pokalon kaj donis al li: Ektrinku, kara kolego...

Li preskaŭ svenis, sed sentis sin devigita gluti la acidon. Ankaŭ al li galopis la pensoj: (Kial mi estu malpli brava? Ĉit!) Kaj ekglutis ĝin. Ili mire rigardis unu la alian kaj baldaŭ ope ridis: La tria ĉar li implikis la mastron, kiu tiel kaptiĝis en propra kaptilo; la mastro ĉar li trompis ilin, kaj ili superruzis lin; la unua ĉar li trompis la duan, kaj la dua ĉar li perfidis la trian! Ĉiu ridis pro merito super la alia. Dume la horoj trotis for kaj ili iris dormi.

Kiam ne zumis aeroplanoj, ankaŭ ne ekzistis hoteloj en vilaĝoj. Tial la venigitaj muzikistoj estis gastoj en vilaĝanaj hejmoj. Ankaŭ la gepatroj de Paŭlo konsentis gastigi du el ili kvankam aparta ĉambro mankis. Matracon de sia lito ili sternis en la saloneto, surmetis kapkuse non kaj tukojn tiel dividante kun la muzikistoj sian liton. Tie do la du gastoj estis dormantaj, eble songantaj pri pafoj, viktimoj kaj danĝero troviĝi inter fiaj vilaĝanoj, kiam Paŭlo, ne sciante pri la gastoj, enŝteliĝis sekrete, silente, mallume, nudpiede, tenante ŝuojn en manoj... kaj alpuŝiĝis al sternita matraco kaj pum! Li falis laŭ sia longo sur la dormantojn, kies kapojn li trafis per la ŝuoj mane tenataj.

— Krimuloj! Stelistoj! Fantomoj!

— Ĉit! Ĉit! Ne krii, ne alarmu!

— Huj! Oj! Mia kapo! Helpon al ni! Stelistoj!

Kia baraktado antaŭ ol la patro aperis kun lumanta kandelolo! Tiel la planita sekreto vekis la gepatrojn, alarmis la najbarojn kaj distris la vilaĝanojn, ĉar la muzikistoj emocije rakontadis, ke post la nokta pafado, Paŭlo kvazaŭ fantomo saltis sur ilin, batis la kapojn per ŝuoj, kaj...

Baldaŭ iu najbaro ŝatanto de romanoj detektivaj, dedukte imagis ke la pafinto povas esti nur Paŭlo, kiu fantome timiĝis la muzikistojn, ĉar se «komenca inklino daŭras ĝis la fino», la fino venas post la daŭro del' komenca inklino. Por certigi li venis al Paŭlo:

— Oni diras, ke la pafinto estas vi mem, kaj mi dividas tiun opinionon.

— Kian pruvon vi havas? Kion vi vidis, aŭdis aŭ tuŝis?

— Pri tio, poste: unue diru, ĉu vi estas preta iri al juĝisto. Se vi estas senkulpa, vi povas diri jes. Tamen, se vi diros jes nur fanfarone, vi devos prui al li vian senkulpecon por eviti la punon. Ha! Kion vi decidias?

— Iri rekte al juĝisto; sed...

— Ha! Sed... sed kio?

— Vidu kiel malnova estas mia pantalono; jen flikita ŝiro, jen tri makuloj, jen eluzita flanko. Pruntu al mi novan, kaj hot! Antaŭen!

La akuzanto estis tiel certa, ke li neiel hezitis: Hejmen: Kaj jam en nova pantalono Paŭlo sekvis lin al juĝisto.

— Sinjoro, jen la nokta fantomo, la teroristo, la pafinto, la...

— La faktojn mi petas, la faktojn — diris la juĝisto — Kion vi scias, aŭdis, vidis? Kiom da atestanoj? Pri la fantomo, Paŭlo jam konfesis ke tio estis nura akcidento. Ĉu vi vidis la kuglojn?

— «Se komenca inklino daŭras ĝis la fino», Paŭlo iris ĝis la fino pro tiu komenca inklino. Ĉu ni ne konas nin? Mi povas venigi dek personojn kiuj atestos, ke ili aŭdis kaj timis kiel mi; ankaŭ dek fraŭlinojn kiuj atestos, ke ili svenis de timo. Paŭlo vizitis la balon; je kioma horo li venis hejmen? Li mem respondu!

— Sinjoro, sciu ke mia najbaro havas en la kapo muŝon de detektivaĵoj, kio kompreneble, konfuzas lin. Kiom valoras Dek atestantoj? Mi povas venigi Cent personojn, kiuj atestos ke ili ne aŭdis, kaj ankaŭ Cent virinojn, kiuj atestos ke ili ne svenis, ĉar pro honesteco tiuhore estis jam dormantaj. Nur falsajn perlojn li tredas. Ĉu eble li asertus ankaŭ, ke mia pantalono apartenas al li?

— Memkompreneble, ĝi estas mia! Ĉu vi malkonfesos ankaŭ, ke mi pruntis ĝin?

— Sinjoro, diris Paŭlo, vi mem konstatas ke li havas muŝon en la kapo.

— Nu, — surprizite diris la juĝisto — estas strange ke vi denuncas personon, kiun laŭ via diro vi favoras per nova pantalono. Reiru hejmen ambaŭ, kaj ne plu ŝovu la nazon en fremdan vazon. Ni estas tre okupataj ĉi tie, kaj fakte jam sufiĉas al ni la veraj faktaj faktoj.

La Tempo-bobeno turniĝas kaj vivmanieroj ŝanĝiĝas. Paŭlo edziĝis kaj dum multaj jaroj ne plu estis aktoro de vilaĝaj intrigoj, ĝis kiam... pro la takto de l' Progreso nombraj agentoj eniradis vilaĝojn. Unu el ili, agento de asecura kompanio plej multe insistis al Paŭlo:

— Por modesta sumo monata, nia kompanio asekuris vin kontraŭ la morto. Kiu estas certa ĝisvivi la proksiman jaron? Certe neniu! Kaj se vi mortus asekurite, via edzino ricevus multe da mono, multe

pli ol ŝi ricevas per via laboro. Jen ekzemple Sinjorino Barella el proksima vilaĝo Muŝume vivas nun kiel riĉulino dank' al antaŭzorgo de sia edzo, kiu subskribis kontrakton kaj baldaŭ forŝovis sin al alia mondo.

La mono tentis lin, sed estis necese morti! Mono mondon regas; ankaŭ ĝi povis en momento eksciti en lia cerbo la densigitan ruzecon de lia vivado. Li subskribis kontrakton.

Post nelonge ili transloĝiĝis al montodomo, malproksime de la vilaĝo, kie homaj rilatoj estis neoftaj. Al ĉiu okaza renkontado li estis afabla kaj servema. Iom post iom li faris al si renomon de bonkora kampulo; sed samtempe trafis la orelojn de l' montanoj la lamenta voĉo de lia edzino, kun la sciigo, ke de kelka tempo li estas tre malsana. Tial Paŭlo ne plu estis vidata, en tiu plej kruda sezono, kiam pluvo, vento, neĝo kaj frostoj restigas la homojn apud agrabla kameno. Paŭlo kuŝadis en lito, nur manĝetis, ne prirazis la vizaĝon nek pritondis la kapon. Per ajlobulbo li febrigis sin, kaj haladza ĉambro maskis la ajlodoron. La tuta dormoĉambro spiris etoson de mizera, nescia, naiva familio, kiu antaŭsentante lian forpason jam preparadis nigrajn vestojn.

Je tiel grava momento oni venigis la jam maljunan kuraciston, kiu ankaŭ mem pli preferus resti apud la kameno ol piedirado monten kontraŭ frosta ventado.

Tiu etoso trompimpresis la kuraciston, kiu tial konjektis probablan forpason. Kiel li povus eĉ imagi, ke malsanulo fripone ŝajnis sin mortanta, preskaŭ mortinta? Post du tagoj la vetero estis ankoraŭ pli kruela. La ruza edzino ne atendis la kuraciston, sed pelis sin al li sur la monto en nigra vesto, plorsingultante: Kara Doktoro, mia edzo mortis —pace ripozu pardonite de Dio— Mi vin petegas, ne almetu vian delikatan korpon al tiu mortiga vetero. Je via vivo!

Per tiaj kaj similaj vortoj ŝajne fluan-taj de turmentata koro, ŝi prosperis konvinki lin fari mortateston. Duobliĝis ŝia plorado kaj larmegoj fluis survange. «Pace ripozu» —diris la kuracisto—.

Aŭdinte onidiron, ke «putre krevis lia internaĵo», la lignaĵisto kiu faris la ĉerkon memvole rezignis la kutiman propramana enĉerkigon, kiun plenumos la familianoj mem pro la danĝera eliĝanta miasmo. La pastro, ricevinte mortateston registris forpason de nova paroĥano kaj ekpreparis pro tre modesta pago pli modestan ceremonion. La kapelsonoriloj batadis super malvarma, preskaŭ dezerta loko lamentajn, obtuzajn Ding! Dong!... dong! Sed... kiu vidis la mortinton? Neniu. La haladza miasmo estis plej taŭga fortimigilo. Se iu tamen insistis por lasta adiaŭo, la edzino dolore, larme, tremvoĉe sufloris: Haladzo, miasmo, danĝero... rezignu.

Ding! Dong!... dong! La fetora mortinto estis preta, kaj Paŭlo, la vivanta mortinto alnajlis la kovrilon. Poste li elŝtelis sin el la domo, rekte al proksima monteto, ĉar li jam ekzentis sin malsana kaj volis spiri liberan aeron; ankaŭ de tie, ĝuis la pastran ceremonion al sia surgato. Ding! Dong!... dong!

— SINQUITATES... PER CHRISTUM DOMINUM NOSTRUM... AMEN!!

Sonorado, mortkantado nun eksonis tra l' silento, kaj Paŭlo, supre starante admonis per milda voĉo: Kantu, multe kantu por li, la granda pekulo!

En la tombon de l' monteto la ĉerko baldaŭ venis. De tiam la edzino devis demarŝi sole, ĉar Paŭlo estis, devis esti mortinta. Ŝi ne povis pli longe atendi la riĉecon. Tiu agento tiel dolĉe ŝmiris al ili la lipojn! Ja ŝi ne sciis, ke tiaj kompanioj enspezas ial ajn, sed pagas nur kontraŭvole. Tro baldaŭ ŝi iris peti suspektiga konduto por profesie suspektemaj homoj. Oni diris al ŝi, ke la mono venos nur post iaj formalajoj, nome traserĉoj, demandoj, pristudoj, atestoj, paperoj, subskriboj, revizio, konformeco kaj plena aprobo de la Direktoro de l' Centra Kompania Oficejo. Ŝi paliĝis kaj iom balbute respondis demandojn, ĉar ŝi ne estis sufiĉe klera por jongli per vero kaj malvero inter mortinta vivanto kaj vivanta mortinto. Ĉe la kompanio kreskis la suspekto: «Io stranga», oni diris.

Al inspektoro la kuracisto rakontis la tutan veron, kaj la lignaĵisto, la pastro, la enterigisto kaj najbaroj konfesis, ke ili ne vidis la mortinton, ke onidire li mortis pro mistera, kreviga miasmo.

Antaŭ ol pagi, asekuristoj movas ĉielon kaj teron; jes, teron ili movis, ĉar ili prosperis ĉe la juĝisto ordonon por malenterigo de la ĉerko. Emociiga momento. La fosisto preskaŭ timis, ĉar neniam antaŭe li faris tion, speciale al krevulo kies fetora miasmo estis tiel danĝera. Li detiris la kovrilon kaj la mortinto aperis en sia nudeco: Sako plena je sablo. Kaj la haladzo? Pardonu, sed pro la vero mi diru, ke Paŭlo kaj edzino ŝutis aŭ verŝis sur la sakon... la tutan... enhavon... de... sia ventro.

La pastro krucosignis sin kaj ekĝemis: *Mirabile visu.*

Paŭlo flugpaŝe fuĝis, lia edzino estis malliberigita, kaj la spicita novaĵo furoris ĝis malproksime en vilaĝoj.

Se vi pensas ke mi rakontis nekredblaĵon, atestos, ke mi bone memoras la maljunan Paŭlon; mi atestos ankaŭ, ke dum kelka tempo la ĉerko veturis de vilaĝo al vilaĝo, kies anoncistoj trumpetadis:

— Tratteratra! Tratteratra! Morgaŭ alvenos la ĉerko en kiu Paŭlo la Fetora enterigis sin; ĝi estos vizitebla vespere por nur unu spesdeko. Tratteratra! Tratteratra!!

Salvador Gumá

EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJĜOJ

JURA HISTORIO KAJ HOMAJ RAJTOJ EN IJR

En decembro 1979 aperis la dua, 48-paĝa numero de *Internacia Jura Revuo* (IJR), organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.

Tiu ĉi numero estas ĉefe dediĉita al jura historio kaj homaj rajtoj. Prof. D-ro S. Anagnostakis koncize pritraktas la jurpunajn ideojn, plu aktualajn, de Aristotelo, unu el la plej grandaj pensuloj de ĉiuj epokoj, dum kand. jur. T. A. Høeg lerte prezentas kaj klare komentas plurajn interesajn aspektojn de sklaveco laŭ antikvaj leĝoj. Eĉ tiuj du elstaraj kontribuoj estas iusence ligitaj al la homaj rajtoj, sed la artikolo de D-ro K. Perko pri la homaj rajtoj en Austrio kaj tiu de Advokato G. Griniatsos pri *Internacia Amnestio* rekte rilatas al tiu vasta sfero de internacia, kompara kaj interna juro, tre grava por la persona libereco de ĉiu individuo. Ankaŭ la unua el la pluraj eroj en la rubriko *Notoj*, en kiu la redaktoro, Prof. I. Lapenna, korektas miskomprenon de juro pri homaj rajtoj kaj misprezenton de historiaj faktoj, estas ligita al la du ĉeftemoj. En la rubriko *RECENZOJ* aperas kritika recenzo-artikolo pri la anglalingva traduko de verko reflektanta la nuntempan sovetan koncepton de internacia juro. La *OFICIALA INFORMILO* enhavas plurajn informojn por la membroj kaj abonantoj.

Konforme al la promeso en la antaŭa numero, en kiu aperis Serio A de «Sugestoj por Kompletigo de la Jura/Diplomatia Terminaro» de D-ro L. Dubravsky, nome terminoj netroveblaj en *Plena Ilustrita Vortaro*, tiu ĉi numero enhavas Serion B de la Sugestoj. Temas pri novaj signifoj aldone al tiuj entenataj en la *Plena Ilustrita Vortaro* de Prof. G. Waringhien. La sugestoj de D-ro Dubravsky estas plia kontribuo al la vastigo de la jura-diplomatia terminaro, kiun IJR evoluigas jam dum multaj jaroj.

IJR aperas du fojojn jare kaj ĉiu numero estas 48-paĝa plus kovriloj. Kvankam faka, laŭ sia enhavo ĝi estas interesa ne nur por juristoj, sed por ĉiuj kleraj personoj, kiuj interesigas pri aktualaj juraj demandoj en diversaj juraj branĉoj. La membroj de IEAJ (kotizo 120 aŭstriaĵ ŝilingoj jare) ricevas la revuon senpage, sed ĝi estas abonebla ekster la membreco, kaj la jara abono estas same 120 aŭstriaĵ ŝilingoj aŭ egalvaloro jare. *La kotizojn, abonojn kaj kontribuoj por la Fondaĵo IJR akceptas la sekretario-kasisto D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Austrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.*

IX^a INTERNACIA KONGRESO DE KIBERNETIKO

Namur (B), 8/13-9-1980

Lastmomenta Informo

La 19-an de januaro 1980, dum la estrarkunsido de la Internacia Kibernetika Asocio ekestis la fina decido, ke la Internacia Lingvo estu akceptata kiel oficiala, tria lingvo de la kongreso por ĉiuj eroj de la programkajero, la korespondado, la avertiloj surlo-kaj, ktp. — Mankas nur statutŝanĝo certiganta, ke ankaŭ estonte la Internacia Lingvo estu la samranga tria lingvo de IKA. Pri tio oni decidis dum la ĉefkunveno de IKA en Namur dum la kongreso.

Estus grandega paŝo antaŭen en la sciencan kampon, se ankoraŭ kelkaj sciencistoj kaj teknikistoj (el la soci-sciencaj, teknikaj, biologiaj kaj medicinaj same kiel el la psikologiaj kaj pedagogiaj aplikadkampoj de la kibernetiko inkluzive informadikon) anoncus prelegojn ĝis la 1-a de marto ĉijara, kaj se kelkaj dekoj da subtenantoj de la Internacia Lingvo partoprenus la kongreson kaj la ĉefkunvenon de IKA.

Konstanta adreso por uzantoj de la Internacia Lingvo: Institut für Kybernetik (Kleinenberger Weg 16 B, D-4790 Paderborn, FR Germanujo).

NI INFORMAS

Pro malsano, S-ro Heinrich Müller ne povas daŭrigi sian laboron kiel peranto por «Horizonto». Ni kore dankas al nia kara amiko sian bonegan laboron favore al la revuo, kaj deziras al li baldaŭn kaj plenan resaniĝon.

Samtempe ni tre dankas al S-ro Rudolf Helmke sian pretecon agi kiel peranto por «Horizonto». — En la kovrilpaĝo, sub FR Germanujo, vi povos legi sian nomon kaj kompletan adreson.

I. G.

Kun profunda bedaŭro ni informiĝis pri la forpaso de sindona pioniro de nia movado.

José Santamaría Neira

La 7-an de decembro 1979 mortis en Bilbao, S-ro José Santamaría Neira (1887-1979), kunfondinto en 1906-a de la Esperanto-Grupo de Bilbao, li estis nuntempe la dojeno de la Bilbao-a esperantistaro.

Li kontaktis kun Esperanto en 1905-a, kaj de tiam li restis fidela al la Zamenhofa idealo. Profesie bankoficisto, loĝis dum pluraj jaroj for de Bilbao, malgraŭ tio li aktive laboradis por Esperanto kaj plej multe klopodis por disvastigi ĝin. De 1909-a ĝis 1913-a oni publikis en Bilbao interesan monatan gazeton. — Sub la titolo «Nova Sento», ĝi heroldis la esperantismon de la tieaj samideanoj; krom la ordinaraj novaĵoj de la Esperanto-Grupo ĝi enhavis literaturan fakon al kiu multe kontribuis nia forpasinta samideano sub la pseŭdonimo «Virgilio». — Reveninte al Bilbao, li organizis la grupan bibliotekon kaj zorgis pri ĝia bona funkciado; plurfoje, li estis estrarano de la societo.

Dum sia longa esperantista vivo, li gvidis multajn kursojn, partoprenis diversajn kongresojn, kaj malgraŭ sia alta aĝo, li, ĝis la fino daŭrigis siajn esperantajn kontaktojn.

Li pace ripozu!

Por la esperantistoj de Bilbao nian sinceran kondolencon.

SCIIGO PRI LA INTERNACIA KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO EN 9 LINGVOJ

Mi referencas al mia komuniko sur paĝo 11 de Horizonte II-a jaro N-o 7 ke post mia retiriĝo kiel redaktoro de l' ĉi-supra vortaro la eldona firma nomumis s-ron E.L.M. Wensing kiel revizionton. Mi mem emfaze malakceptis lin por tiu funkcio pro lia ĝenerala netaŭgeco.

En 30 novembro 1979, do proksimume *tri jarojn poste*, la eldona firma skribis al mi interalie jene: «Ŝajnas probable ke ne aperos nova eldono de la 9-lingva vortaro. Montriĝis ke EKI* (kiu en la praktiko estas Wensing-F.M.). NE kapablas (emfazo mia-F.M.) adekvate revizii kaj ĝisdatigi la libron. Do, kiam la nuna stoko de 100 kaj kelkaj ekzempleroj elvendiĝos, la libro tute malaperos el la komerco».

F. Munniksma (Anglio)

* Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio.
En decembro 1979.

ESPERANTO EN HISPANAJ ĴURNALOJ

Ĉifoje la informo venas de Asturio, norda hispana regiono

Sub la titolo «Setenta Aniversario de un prestigioso esperantista» (70-a jarreveno de prestiĝa esperantisto), aperas artikoleto en la ĵurnalo de Gijón «La Nueva España», la 29-an de novembro 1979.

La informanto skize, sed klare prezentas D-ron Ivo Lapenna, kaj informas pri lia Esperanto-laboro dum pli ol kvindek jaroj, substrekante lian eksterordinaran agadon en Montevideo en 1954-a jaro dum la Ĝenerala Konferenco de UNESCO, pri kio promesas novan artikolon. — Fine li diras: D-ro Ivo Lapenna, verkisto, oratoro, ĵurnalista kaj profesoro kies meritoj estas internacie agnoskitaj, krom multnombraj artikoloj, prelegoj kaj paroladoj tre interesaj, publikigis diversajn librojn originale verkitaĵn en Esperanto: «Retoriko», «Elektitaj Parolado kaj Prelegoj», «Aktualaj Problemoj», «Esperanto en Perspektivo», «Hamburgo en Retrospektivo»...

La artikolo finiĝas por jena simpla frazo: Sinceran dankon al majstro Lapenna pro sia plena sindediĉo.

HOMAJ RAJTOJ: MISPREZENTO DE HISTORIAJ FAKTOJ

(Noto: Kun la permeso de la aŭtoro, Prof. I. Lapenna, sube aperas parto de lia artikolo publikigita en n-ro 2/79 de *Internacia Jura Revuo*. — *La Redakcio*.)

der esperantist, organo de la t.n. Centra Laborrondo Esperanto de GDR, fakte sekcio de la ŝtata-partia Kulturigo de Germana Demokratia Respubliko kaj «aliĝinta asocio» de UEA, publikigis en n-ro 94 (2/79) parton de artikolo de Prof. D-ro H. Klenner sub la titolo «Kiu Garantias la Homajn Rajtojn?». La redaktoro, D-ro D. Blanke, komitatano de UEA kaj membro de la Estraro de la nuna CED de UEA, enkonduke informas, ke la publikigo ŝuldiĝas al la alvoko de UEA celebri la 30-jaran datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj ke la revuo prezentas «kompreneble marksisman-leninisman vidpunkton».

En nia politike neŭtrala faka periodaĵo ni ne deziras reagi je la atakoj de Prof. Klenner kontraŭ la okcidentajn demokratiojn, sed ni opinias, ke estas nia devo de juristoj korekti erarojn pri juro kaj misprezentojn pri historiaj faktoj.

..... (faka argumentado, ellasita).

Historiaj Faktoj

Skribante pri la militkrimuloj en ligo kun la homaj rajtoj, Prof. Klenner asertas: «*La Nurenberga proceso kontraŭ la ĉefaj militkrimuloj ne okazis pro tio, ke art. 6 de la statuto por la internacia militista tribunalo de 1945 fiksas ke krimoj kontraŭ la paco estu juĝataj kiel krimoj kontraŭ la humaneco, sed pro tio, ke Sovetunio kaj ĝiaj aliancitoj rompis la nukon al Hitler.*»

Nekontestebla historia fakto estas, ke USSR garantiis la suverenecon kaj teritorian integrecon de Pollando en la Pactraktato de 1921 kaj en la Pakto pri Neagreso de 1932, plilongigita per la Protokolo de la 5-a de majo 1934 ĝis la 31-a de decembro 1945. Aldona Deklaro de la 26-a de novembro 1938 rekonfirmis la Pakton pri Neagreso. Historia fakto ankaŭ estas, ke en aŭgusto 1939 Molotov kaj Ribbentrop subskribis la Pakton pri Neagreso inter USSR kaj Nazia Germanio, kio ebligis al Hitler lanĉi sian atakon kontraŭ Pollandon la 1-an de septembro 1939. Dum Britio kaj Francio honoris siajn garantiojn al Pollando kaj 3-an de septembro deklaris militon al Nazia Germanio, Soveta Unio invadis Pollandon la 17-an de septembro krude malobservante la menciitajn traktatajn obligaciojn en rilato al tiu lando. La 29-an de septembro 1939 Nazia Germanio kaj Soveta Unio interkonsentis pri divido de Pollando kaj la 31-an de oktobro 1939 V. Molotov, la tiama komisararo pri eksterlandaj aferoj, provis pravigi tiun evidente agresan agon en sia Raporto al la Supera Soveto de USSR interalie per jenaj vortoj:

«*Necesas substreki la fakton de la milita malvenko de Pollando kaj la malintegriĝo de la pola ŝtato. La regantaj rondoj de Pollando ne malmulte fieris pri la 'daŭreco' de sia ŝtato kaj pri la 'potenco' de sia armeo. Nu, sufiĉis mallongdaŭra atako sur Pollandon unue fare de la germana armeo kaj poste fare de la Ruĝa Armeo, por ke nenio restu de tiu monstra bebo de la Traktato de Versailles.*» (Citita laŭ *Sovetskoje Gosudarstvo i Pravo*, la ĉefa soveta jura periodaĵo n-ro 5/1939, p. 1.)

La vero plu estas, ke post la eniro de la naziaj trupoj en Parizon kaj la armistico kun Francio de la 22-a de junio 1940, Britio kun la dominioj praktike tute sola daŭrigis la militon kontraŭ Nazian Germanion dum unu tuta jaro kaj venkis la «batalon de Britio» (aŭgusto-oktobro 1940). Nur la 22-an de junio 1941 Hitler atakis Sovetan Union kaj iom poste Japanio Usonon, kio radikale ŝanĝis la situacion, kontribuis al la formiĝo de la granda kontraŭhitlera koalicio, formulita en la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj de la 1-a de januaro 1942, kaj kuraĝigis rezistomovadojn en Francio, Jugoslavio, Grekio, fakte preskaŭ ĉie en la okupita Eŭropo.

Kompreneble, same kiel en la kazo de krimoj laŭ interna juro, internaciaj krimoj laŭ internacia juro povas esti juĝataj nur post kiam la krimuloj estas arestitaj, do, en la kazo de internaciaj krimoj, nur post kiam la kulpuloj estas senigitaj de sia potenco kaj arestitaj ĉu pro malvenko en milito, ĉu pro aliaj kaŭzoj.

Fine, plia rimarketo: Laŭ la aktoj de la 8-a de aŭgusto 1945, la internacian krimon ne konsistigas nur krimoj kontraŭ la paco, sed ankaŭ krimoj kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de milito, kaj krimoj kontraŭ homeco, ekzemple mortigado, ekstermado, sklavigado aŭ disloĝigado de la civila loĝantaro, aŭ persekutoj pro religiaj, rasaj aŭ politikaj kaŭzoj. La faka literaturo pri tiuj demandoj abundas en tre multaj lingvoj. En mia verko *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* unu ĉapitro pritraktas la internacian krimon.

En «esperanto 1979 septembro» d-ro Victor Sadler gratulas sin pro la nova statuto de UEA. Interalie li deklaras: «*Eble plej grave, Prezidanto ne rajtas ofici dum pli ol du sinsekvaj oficerperiodoj. Por tiu nova statuta limigo plej forte batalis ĝuste la nuna prezidanto mem, konvinke argumentante, ke tio necesas por sekurigi la afliuon de novaj talentoj al la pintaj organoj de la Asocio.*» Evidente, se temas pri prezidanto elektita sen ia programo, nur sur intriga plano kiel en 1974, estas preferinde, ke plej rapide venu nova talento. Sed se tio senĉese ripetigos, kion pozitivan alportos tia defilado de «novaj talentoj»?

Kaj ĉe la fino d-ro Victor Sadler kontentige substrekas la novan vortigon de la neŭtraleco koncerne al la aliĝintaj asocioj. «*La nova teksto akceptita en Lucerno forigas tiun postulon, ke la landa asocio estu mem laŭstatute neŭtrala, sed aliflanke starigas al ĝi multe pli specifajn kondiĉojn:*

ke ĝi estas asocio laŭorde organizita kaj vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro politika aŭ religia sinteno aŭ pro raso, lingvo aŭ sekso, kaj ke ĝi skribe konfirmas sian pretecon respekti la Statuton kaj regulojn de UEA, precipe ĝiajn celojn kaj ĝian neŭtralecon.

Krome, ne sufiĉas unufoja deklaro:

Kondiĉo por daŭra aliĝinteco estas, ke la Komitato restas kontenta pri plenumo de la jam difinitaj kondiĉoj kaj deklaro.

La fina teksto de tiu paragrafo 13 estis akceptita kun nur 1 voĉo kontraŭa kaj 1 sindeteno.» Nu, unuavide tia teksto ŝajnas kontentiga, kvankam eĉ neinformitaj personoj povas demandi sin, kial estas forigita el la artikolo 13 la simpla kaj klara kondiĉo, ke povas aliĝi nur asocio *neŭtrala* laŭ la senco de la artikolo 4 de la Statuto. Tamen eĉ la nova teksto estas bona por ĉiuj homoj, kiuj praktikas la respekton de sia vorto. Bedaŭrinde ekzistas ideologioj, laŭ kiuj tia respekto dependas de la «evoluo de la cirkonstancoj»: tiam oni rajtas subskribi ion ajn kaj poste deklari, ke la kondiĉoj ŝanĝiĝis, de kiam okazis la subskribo. Sekve kaj tradicie oni ĉiam postulis en statuto striktan statutan konformecon pri neŭtraleco. Ĉiu bone scias, ke laŭ la plimulto reganta en la nuna Komitato ĉi tiu ĉiam montriĝos «*kontenta pri plenumo de la jam difinitaj kondiĉoj kaj deklaro*». Tial tia nova teksto, kiu estas plej favora por kontentigi partion superregantan la plej altan organon de la asocio, fine evidentigas kiel la plej danĝera el ĉiuj por la neŭtraleco de la asocio.

—oOO—

En la sama numero Boris Kolker prezentas analizeton pri ĉiu el la «*dek unu prelegoj en kvar tagoj*» de la 32-a sesio de Internacia Somera Universitato. Interalie, koncerne al la prelego de Tom Arbo Høeg (Norvegio) «*Pri sklaveco laŭ antikvaj leĝoj*» oni povas legi: «*Sklaveco estis produkto de ekonomia evoluo, ĝi aperis kune kun la privata proprieto*», kvazaŭ la sklaveco ekzistus nur pro kaj en reĝimo de privata proprieto; nu, ĉirilate sufiĉas konsideri la historion de la egiptoj kaj la nunan staton de multaj homoj en kolektivismaj sistemoj!

—oOO—

«*...Trudiĝas konstato, ke la agado de CED nur malforte sentiĝas en la Movado kaj ke oni sen ĉi tiaj kunsidoj en la kongresoj facile povus eĉ forgesi pri la ekzisto de CED. Kun Esperanto-dokumentoj (anstataŭ la iamaj CED-dokumentoj) nun ekster la laborakadro de CED komencas manki ia daŭra vivsigno de ĉi tiu institucio.*» Unualege oni povus kredi, ke tiaj linioj legiĝas por la unua fojo en HORIZONTO; sed fakte tute ne estas tiel, kaj en la okazo HORIZONTO nur reproduktas kritikon aperintan en «esperanto» (p. 152). Tiel, neimageble post kvin jaroj — kvankam CED estas gvidata de tri estraranoj* (U. Lins, D. Blanke kaj J. Pool) anstataŭ unu — la bilanco fariĝis nula!... Kaj jen por la kuracato oni plue povas legi, ke oni pensas plenigi la vakuon per plia homo: «*...Oni ĉiam pli ofte ripetas la bezonon de aparta volontulo/oficisto, kiu prizorgus ankaŭ interkongresan funkciadon de CED.*» Tamen!... ĝis en 1974 ĉu CED ne bone funkciis sen tiom da «prizorgantoj»?

—oOO—

Kaj fine jen dise tra la numero 11-12 de HEROLDO (7/9/79) kelke da spikumindaj komentoj de la Redakcio, per kiuj plene elstarigas ĝia pli-ol-dek-kvin-jara «objektiveco»! **KOMISIONO PRI PLANADO** — Komencis detalan priekzamenon de la nova kvinjara laborplano de UEA. Ĝi ankaŭ varme rekomendis akcepton kaj efektivigon de iu stranga propono pri solenado de la «Tago de la Floroj», t.e. rememorigo (aŭ kulto) de niaj mortintoj kaj mortintaĵoj. (*Nia movado fariĝas ĉiam pli muzeema! N.d.l.r.*) La substrekado

estas nia; sed interalie, kial «kvinjara», precipe se la estraroj estas trijaraj? Estas preferinde lasi laborplanon sen tempolimo. Kaj cetere kial «stranga» la propono? Kial «muzeema» la movado?

KOMITATO — Daŭre posthamburga harmonia etoso... Kvazaŭ la etoso antaŭ Hamburgo neniam estus estinta harmonia!

«Stakanovista» oni povus difini la laboron de la Komitato de UEA dum la Lucerna kongreso. Ĉu tio signifas, ke la etoso reganta la Komitaton estas komparebla kun tiu de stahanovismo en Stalina Sovetio? (Vidu la difinon en PIV p. 1026).

Tre disvastigita opinio inter la komitatoj kaj inter la publiko estis, ke troa senĉesa, principa harfendado pri ĉiu punkto, subpunkto, punkteto kaj detalo simple malutilas al la diskutoj kaj perdigas amason da tempo. Por esti klaraj, ni devas sincere aldoni, ke tre multaj esperas, ke estonte la sinteno de Francisko Simonnet (kies bonintencon neniu pridubas) en la Komitato fariĝu pli pozitiva. Ĉu opinio disvastigita «inter la publiko»? Hm! Hm! Necesus procedi per opinio-sondo! Sed jen rimarko, kiu lasas multon pripensindan ĝuste pri la etoso de la laboro en la Komitato: ĉu do «estonte sinteno pli pozitiva» signifas pli da konformismo al la debata sistemo de H. Tonkin?

NOVA STATUTO DE UEA — Ni substreku, ke unu afero, kiu ne ŝanĝiĝis en la organizado, estas, ke UEA restas neŭtrala. Ne nur tio ĉi: la koncerna paragrafo pri la neŭtraleco estas plifortigita. Tamen la diversaj Landaj Asocioj havos iom pli da fleksebleco: ja necesas, ke ili estu vaste malfermitaj al la civitanoj de la propra lando kaj ke ne estu limigoj, ekzemple pro la raso, politika konvinko aŭ religia kredo. Ĉio ĉi signifas do, ke la neŭtraleco — anstataŭ esti iu negativa fenomeno — estas esence pozitiva fenomeno. Pro kio do la antaŭa difino estis «negativa fenomeno»? Ĉu tial, ke ĝi tro efike malbermesis la influon de politika partio? Ĉiuokaze jen sub bela vortelturniĝo vere «elasta fleksebleco»!

GAZETARA SERVO — Ĉi-jare entute mankis la Esperantlingva eldono de la Gazetara Servo... Estas vero, ke almenaŭ de dek jaroj, kiam Marinko Ĝivoje ne plu okupiĝis pri tiu servo, ĝi de jaro al jaro fariĝis malpli kompleta, por fine... malaperi. Nu, ĉu vere «de dek jaroj»?... Kaj oni nenion faris por helpi!

J. T.

* Eĉ en Varna estis aldonitaj sekretario kaj help-sekretario, Renée Triolle kaj François Lo Jacomo.

ABONO AL «HORIZONTO»

Jen nia unua numero por la jaro 1980-a. Nia deziro estis kaj restas ke la revuo estu plaĉa al vi. Vian jarkotizon por 1980, vi povas pagi rekte al la Administracio aŭ al niaj perantoj laŭ la listo, kiu aperas en la revuo.

Pro la daŭra plialtiĝo de la kostoj en Hispanujo, dum la 5-a Konferenco de N.E.M. en Ateno oni decidis altigi la abonon al «Horizonto» je 20 %. Do, bonvolu atenti pri la nova kotizo.

Kiu sendos per banko ia ajn pagon al la Administracio de «Horizonto» bv. aldoni 100 pesetojn por kovri la banko-kostojn.

Atentu al mia nova adreso: P.º de la Constitución, 35, Zaragoza-1, Hispanujo.

Inés Gastón

SPECIALA NOVJARA DONACO AL «HORIZONTO»

La 5-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado aprobis la proponon de Prof. Dr. Ivo Lapenna prezenti al «Horizonto» specialan novjaran donacon kiel signon de rekono pro la pozitiva rolo, kiun la revuo ludas en la nuntempa Esperanto-Movado, kaj por certigi ĝian pluan regulan aperadon. Jen la nomoj de la donacintoj:


Gis nuna sumo	91.242	pesetoj
Ges-roj Holmes	1.388	»
S-ro W. Kaukal	600	»
S-ino Lis Thune	6.060	»
	= 99.230	»

MALLONGA SKIZO

pri la regiono en kiu okazos la tuttaga
ekskurso dum la

VI-a INTERNACIA KONFERENC
de la **NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO**
en **STRASBURGO**

(26-a Julio - 1-a Aŭgusto 1980)



Post STRASBURGO, la ĉefurbo de la departamento BAS-RHIN (Malalta-Rejno), la dua granda urbo de Alzaco estas MULHOUSE (prononcu MULUZ, tio signifas «La Domo de la Muelilo»). Longatempe svisa, ĝi estis kunigita al Francujo nur post la granda Revolucio, en 1798.

Nuntempe, kun siaj 120.000 loĝantoj, ĝi estas grava industria urbo ĉefe konata pro siaj proksimaj minejoj de potaso kaj pro siaj tekstilaj fabrikoj kie oni faris, unuafoje, en la 18a jarcento, premdesegnaĵon sur ŝtofo. Ankaŭ en tiu urbo naskiĝis, en 1852-a, la ideo de konstruado de laboristaj domoj: fakte, la tiama urbestro, Jean Dollfus, estis la unua homo, kiu en Eŭropo, havis la ideon krei, en la nomo de l' moralo, tiajn domojn, higienajn, komfortajn kaj malmultekostajn. — Mulhouse situas 100 km. sude de Strasburgo, sur la granda akso Strasburgo — Baselo, sed nia ekskurso ne kondukos nin ĝis tie.

Tamen, ni vidos COLMAR (Kolmar) si-

tuanta sur la sama akso, 66 km sude de Strasburgo.

Colmar, kvankam nur la tria urbo de Alzaco laŭ la nombro de la enloĝantoj, (70.000) estas la ĉefurbo de la departamento HAUT-RHIN (Alta-Rejno).

Ĝi estas ĉarma urbo en kies centro postrestas multaj interesaj domoj el la mezepoko. Mondkonata estas ĝia MUZEO de «UNTERLINDEN» (Sub la Tilioj) kiun ni vizitos mallonge. Fakte ĝi estas la plej vizitata muzeo de Francujo post la muzeo de la «Louvre» en Parizo. Ĝia ĉefa valoraĵo estas «Le Rétable d'Issenheim» (La Retablo de Isenhajm) pentrita en 1515-a de Mathias GRUNEWALD; tiu Retablo estis alportita el la monaĥejo de Issenheim; malgranda vilaĝo sude de Colmar.

Colmar estos la el-kaj re-irpunkto de nia montara ekskurso. Nordokcidente situas KAYSERSBERG (Haysersberg = «Monto de la Imperiestro»), urbeto en kiu oni povas vidi interesan preĝejon el la 12a

jarcento, urbdomon renesancan kaj ruiniĝintan kastelon kiu iam defendis la enirejon de la valo kontraŭ la malamikoj. Sed tiu urbeto estas precipe konata, ĉar en ĝi naskiĝis la mondfama D-ro Albert SCHWEITZER (Ŝvajtser), organisto, muzikologo, pastoro kaj kuracisto — gajninto de la Nobel Pac-Premio en 1952-a. Per tiu ĉi mono, li konstruigis hospitalon por la lepruloj en Afriko. Li skribis unu el la plej elstaraj verkoj pri la komponisto BACH (Baĥ) kaj estis la «mirakla doktoro» de multaj malsanuloj en Lambarene (Cambono, Ekvatora Afriko). Lia naskiĝdomo en Kaysersberg estas tipa alzaca domo, kun ĝardeno plena je poezio.

Post Kaysersberg, komenciĝas la grimado en direkto al la «Col du BONHOMME» (Pasejo de «La Vireto»). Sur tiu pasejo, 950 metrojn alta, estas la limo inter la departamentoj HAUT-RHIN kaj VOSGES (prononcu Voĝ). Tie troviĝas ankaŭ la iama landlimo inter Francujo kaj Germanujo. Oni tuj rimarkas ke la konsonanco de la geografiaj nomoj estas ne plu germana (kiel ekzemple Kaysensberg), sed franca (Le Bonhomme, Les Bagenelles, ...). Ĉe la pasejo BONHOME, oni trovas agrablajn restoraciojn kaj belegan vidaĵon sur la «Altaj Voĝoj».

De tie oni rapide atingas la «ROUTE DES CRETES» (La Aŭtovojo de la Krestoj); ĝi sekvas longe la malnovan landlimon: dekstre LORENO, maldekstre ALZACO. Sur la alzaca flanko troviĝas kelkaj belegaj lagoj, inter aliaj, la «LAC BLANC» (Blanka Lago). 1054 m. kaj la «LAC NOIR» (Nigra Lago), postrestoj el la kvaternaraj glaciejoj.

La vojo grimpas pli kaj pli, kaj 21 km. pli sude oni atingas alian altan pasejon, tiu de la SCHLUCHT (Ŝluĥt), 1.139 m. — la germana vorto Schlucht signifas «intermonto» — kie pasas la ĉefa vojo Colmar-Parizo. De tie oni povas facile (unu horon piede) surgrimpi la monton «HOHNECK» (1.362 m.), la plej alta en tiu regiono, de kies supraĵo oni vidas kaj la alzacan flankon, kaj la lorenan kun grandegaj voĝejaj lagoj — LONGEMER, RETOURNEMER, GERARDMER — devenaj de la morenaj baraĵoj de la kvaternaraj glaciejoj.

Ĉe la Schlucht, tri vojoj prezentas sin:

— la daŭrigo, suden, de la Route des Crêtes ĝis la «Granda Balono» (1.424 m.) la plej alta supraĵo de la Voĝeja Masivo — vojo grandparte netrairebla dum la vintro.

— la vojo okcidenten al GERARDMER, fama banloko, kun daŭrigo al Nancio, Parizo.

— la vojo orienten tra la valo Munster, ree al Colmar. — Tiu estos la nia.

De la Schlucht al Munster, la vojo zigzagas sur 18 km. La vidaĵo super la tuta valo estas impone bela.

Survoje troviĝas:

— MUNSTER, urbeto de 5.000 loĝantoj, kiu donis sian nomon al la bongusta fromaĝo «Munster»!!

— GUNSBACH, kie D-ro Schweitzer pasis sian junecon (MUZEO SCHWEITZER).

— TURCKHEIM (Turkhajm) kie, dum la someraj vesperoj, la noktgardisto trapasas kantante la vilaĝon, vestite laŭ la mezepoka maniero; tie oni jam estas en la fama vinlando, kie kreskas la mondkonataj «Traminer», «Riesling», «Tokaj», vinoj eksportataj eĉ al Ameriko.

Malfeliĉe, pro manko de tempo, ni ne povos viziti EGUISHHEIM, unu el la plej ĉarmaj vilaĝoj en la vinlando, en kiu naskiĝis la alzaca Papo LEO — la IXa en la jaro 1004-a.

Sed, ni povos profiti de nia halto en RIQUEWIHR (Rikevir) por aĉeti kelkajn botelojn se tia estos nia deziro!

Riquewihir estas interesa urbeto, tute mezepoka. Dum pluraj jarcentoj ĝi apartenis al la grafoj de Würtemberg, kaj nur en la 18a jarcento, ĝi estiĝis franca. Oni povas admiri la malnovajn remparojn, la turojn (speciale tiun de la «Dolder») kaj la ŝildojn de la restoracioj, veraj artaĵoj.

Laŭlonge de la «VINSTRATO», ni vidos ankoraŭ multajn pitoreskajn vilaĝojn kaj urbetojn, kiel RIBEAUVILLE (Ribovile) kaj BERGHEIM (Berghajm).

Sur nia vojo, ree al Strasburgo, estas ankoraŭ menciinda SELESTAT, (15.000 enloĝantoj), ne nur pro siaj mirinde belaj preĝejoj, romanaj kaj gotikaj, sed ankaŭ pro sia «BIBLIOTEKO HUMANISTA», kiu entenas la tielnomatajn «Inkunablojn», tio estas la unuaj presitaj verkoj, unikaj en la mondo, de la humanista epoko (15a-16a jarcento). Fakte, jam en la mezo de la 15a jarcento. Sélestat havis humanistan lernejon kaj prosperan universitaton, pro kio la riĉeco de la biblioteko kreita en 1452-a. Oni povas admiri tie multajn manuskriptojn, speciale la bibliotekon de Beatus Renanus, kiu enhavas pli ol 2.000 verkojn, la sola humanista biblioteko kiu estas konservita preskaŭ nedifektite ĝis la nuna tempo. Inter aliaj valoraĵoj estas la unue presita Biblio kaj multaj presaĵoj de GUTENBERG kiu elpensis kaj kreis la unuan presmaŝinon en Strasburgo.

Pri Sélestat, mi aldonas personan ĝojon: en la tiea liceo instruas profesoro en latina-greka fako, kiu nuntempe havas pli ol 100 lernantojn de esperanto!!

La Organiza Komitato esperas ke tiu tuttaga ekskurso havigos multe da plezuro al ĉiuj partoprenantoj de la VI-a Konferenco.

Ni do atendas vian mendon!

PIONIRA BULVARDO ZAMENHOF

Okaze de la Internacia Esperanto-Tago, koincide kun la Internacia Jaro de la Infano, la societo «Centro de Esperanto Sabadell» organizis feston sub la patroneco de la loka Urbestro kaj financa kunlaboro de «Caja de Ahorros de Sabadell», la 16-an de decembro 1979.

La nomita festo estis precipe dediĉata al la infanoj, kiuj senpage ĝuis, krom regalo de matenmanĝo (= pano, ĉokolado kaj lakto) okazon laŭplaĉe kolorpentri surteran panelon, lernon de manfaraĵoj, partoprenon de la tradiciaj «gigantoj kaj grandkapuloj» kaj kunkantadon de kanzonoj sub la gvido de fama porinfana artisto.

Fine, la Urbestro de Sabadell oficiale redonis la nomon «Ronda Zamenhof» al centra bulvardo, kiu estas la unua strato el la tuta mondo, kiu plej frue ricevis la nomon de la Majstro, jam la 14-an de julio 1912.

Okaze de tiu aranĝo estis legata dokumento, adresita al la oficialaj instancoj, en kiu oni petas la instruadon de Esperanto en la unuagradaj lernejoj de Hispanujo.

Loka ĉeestinto

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ - 1980

20-a ALVOKO

Dezirante okazigi plue la glorajn INTERNACIAJN FLORAJN LUDOJN, kiuj tiel sole okazadis 19-foje en diversaj urboj de Katalunujo kaj la insulo Majorko, la Kataluna Kunordiga Komitato de la Hispana Esperanto-Federacio ree invitas la esperantistajn poetojn kaj prozistojn ĉiulandajn, konkurse konkuri per siaj verkoj en tiu tradicia Beletra Trobadora Festo kiu celebriĝos en la kadro de la 22-a Kataluna Esperantista Renkontiĝo.

Nunjare estos aljuĝitaj la jenaj PREMIOJ:

POEZIA BRANĈO

- 1.— *NATURA FLORO*: al plej bona am-tema poemo. (Maksimume, 100-versa)
- 2.— *JASMENO*: al plej bona priesperantisma poemo, aŭ al tiu je temo libervole elektita de la aŭtoro. (Maksimume, 100-versa)
- 3.— *VIOLO*: al plej bona humanisma aŭ etika poemo. (Maksimume, 100-versa)

PROZA BRANĈO

PREMIO al plej bona novelo. (Maksimume, 2000-2500-vorta)

TRADUKA BRANĈO

PREMIO al plej bona traduko, jen versa, jen, proza, libervole elektita el kiu ajn katalunlingva verko de moderna aŭtoro. (La tradukinto nepre devas kunsendi fotokopion de la originala teksto.)

La poeziaĵoj ampleksu, maksikume, 100 versojn; la prozaĵoj, 750 vortojn.

La Verdikta Konsistorio rajtos, se eble, aljuĝi subpremiojn.

Ĉiu konkursanto bonvolu priatenti la jenan.

REGULARON

- 1.— La verkojn oni sendu, po 4 ekzempleroj nepre tajpitaj je duoble interspaco, nur ĝis la 10-a de julio 1980-a, laŭ la poŝtstampo, al jenaj nomo kaj adreso de la Sekretario: Gabriel MORA i ARANA, str. Carrió, 5, 4. MANRESA (Barcelona) - Hispanujo.
- 2.— *Ne rajtas konkursi* tiuj verkoj antaŭe premiitaj, tradukitaj aŭ publikigitaj.
- 3.— La aŭtoroj ne povas subskribi siajn konkursaĵojn; sed, krom la titolo, ili devas skribi specifan moton aŭ pseŭdonimon.
Ili enmetu slipon kun siaj nomo kaj adreso en apartan fermitan koverton sur kiu estu skribita la titolo, moto aŭ pseŭdonimo, kaj la elektita branĉo.
- 4.— Kvankam oni devas konsideri ke ĉiu aljuĝota Premio estos, esence, nur honora, ĉiu gajninto ricevos, krom Diplomo, valoran esperantan libron aŭ mondonacon, laŭ ebleco.
- 5.— La Sekretario antaŭsciigos al la ĵus premiitoj la Verdikton por ke ili povu ĉeesti la Feston aŭ elekti siajn anstataŭantojn (precipe, la gajninto de la Natura Floro, kiu simbole oferdonos ĝin al la Reĝino de l' Poetoj, kaj ŝin akompanos ĝis la trono).
- 6.— La Organiza Komitato rezervas al si la rajton, dum unu jaro, publikigi la premiitajn verkojn.

Sabadell, la 15-an de decembro 1979-a